

UNESKO Kuriero

Oktoebro-Decembero 2021

Rakontoj de MIGRADOJ

- **Niĝeriaj migrantoj:**
Serĉi revon ĉiakoste
- **Peruo** alfrontas pliiĝon de
klimataj migrantoj
- **La eksterlandaj ĉinoj:**
Longa rakonto
- "La historio de la homaro konsistas
el **sinsekvo de migradoj**"
Intervjuo kun Eva-Maria Geigl



中国 EL POPOLA
报道 ĈINIO
www.espero.com.cn



IDEOJ

Malferma Scienco:
Tutmonda movado
populariĝas

NIA GASTO

Latin-Ameriko: La ora epoko de
dinosauĝoj ▪ Intervjuo kun Miriam Pérez
de los Ríos

Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj) : 27€ 2 jaroj (8 numeroj) : 54€

Afranko: 8 eŭroj (1 numero)

1 **Membro de UEA**, bonvolu pagi al nia konto ĉe UEA (celi-p)

2 **Se vi ne estas membro de UEA**, bonvolu pagi 66 svisajn frankojn jare aŭ 132 svisajn frankojn por du jaroj al jena konto:

PostFinance, Nomo: LIU JUN,

IBAN: CH98 0900 0000 3048 76172

Post via ĝirado, bonvolu informi min ĉe lamondo@163.com



Abonu la bitversion



**Ĝi estas
100%
SEN PAGA**

<http://www.espero.com.cn/>; <http://esperanto.china.org.cn/>;
<https://en.unesco.org/courier/subscribe>



Sekvu la lastajn novaĵojn de

Kuriero

@unescocourier



Facebook



Twitter



Instagram



Legu kaj disvastigu

Disvastigu kaj reklamu

UNESKO-Kurieron laŭ Libera Aliro
(Open Access), laŭ reguloj de UNESKO
por publikaĵoj.

2021 • n-ro 4 • Eldonata ekde 1948

UNESKO-Kuriero estas eldonata kvarfoje jare, danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko, de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri internacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

Direktoro: Matthieu Guével

Ĉefredaktoro intertempa: Agnès Bardon

Asista redaktoro: Katerina Markelova

Sekcia redaktoro: Chen Xiaorong

Redakta konsilanto: Jenny Dare

Redaktoroj pri lingvoj:

Angla: Shiraz Sidhva

Araba: Fathi Ben Haj Yahia

Ĉina: Sun Min kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo

Franca: Christine Herme, provlegado

Hispana: Laura Berdejo

Rusa: Marina Yartseva

Cifereca redaktoro: Mila Ibrahimova, Linda Klaassen

Fotoj kaj ilustraĵoj: Danica Bijeljac

Kunordigado pri traduko kaj enpaĝigo: Marie-Thérèse Vidiani

Administracia kaj redakcia asistantoj:

Carolina Rollán Ortega

Produktado kaj antaŭenigo:

Ian Denison, Estro pri publikigado kaj var-

markada antaŭenigo de UNESKO

Eric Frogé, Ĉefa asistanto produktada

Cifereca redaktoro:

Denis Pitzalis, Reteja arĥitekto/projektanto

Amaskomunikilaraj Rilatoj:

Laëtitia Kaci

Fasonulo:

Jacqueline Gensollen-Bloch

Kovrila bildo: © Agnieszka Ziemiszewska

Internuloj:

Li Yihong, Zhu Manqing (Ĉinio)

Kuneldonaj redaktoroj

Esperanto: Chen Ji

Kataluna: Jean-Michel Armengol

Korea: Soon Mi Kim

Portugala: Ivan Sousa Rocha

Informo kaj Kopirajtoj:

courier@unesco.org

7, place de Fontenoy, 75352 Paris 07 SP, France.

© UNESKO 2021



Periodaĵo, airebla en Libera Aliro (*Open Access*) sub la licenco *Attribution ShareAlike 3.0 IGO* (CC BY SA 3.0 IGO)

(<http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/>).

Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (*Open Access Repository*) (<https://en.unesco.org/open-access/terms-use-ccbysa-en>). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio flanke de iu ajn lando de UNESKO, koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭ sfero de ties regado aŭ koncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

Malgarantio: UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo.

La bitversio haveblas senpage ĉe

<http://www.espero.com.cn/>

<http://esperanto.china.org.cn/>

http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

Supera organizo: Ĉina Internacia Eldona Grupo

Subtena organizo: Universala Esperanto-Asocio

Eldono: El Popola Ĉinio

Direktoro: Chen Shi

Ĉefredaktoro: Zhao Jun

Aganta ĉefredaktoro: Chen Ji

Tradukantaro: El Popola Ĉinio kaj UEA-Teamo

Provlegantoj: Chen Ji, Mao Zifu, Rafael Henrique

Zerbetto, Rob Moerbeek kaj José Antonio del Barrio

Presita en Pekino kaj Parizo

Presita de Limigita Kompanio Yincheng-Beichuang

en Pekino

Adr: P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio

Tel: +86-10-68996130

+86-10-68996590

Retpoŝto: lamondo@163.com

CN 10 - 1711/C ISSN 2096 - 9082

Prezo: 6.8 eŭroj

Enhavo

4

LARĜA ANGULO

RAKONTOJ DE MIGRADOJ

Niĝeriaj migrantoj: Serĉi revon ĉiakoste	7
<small>Lanre Ikuteyijo</small>	
Rifuĝintoj: Moviĝi preter la antaŭjuĝoj	10
<small>Alexander Betts</small>	
Peruo alfrontas pliigon de klimataj migrantoj	14
<small>Laura Berdejo</small>	
En Kanado, centro traktas la vundojn de ekzilo	17
<small>Guy Sabourin</small>	
Poŝtelefonoj: Nemalhavebla ilo por migrantoj	20
<small>Moha Ennaji</small>	
Venera Toktorova: Historio de kirgiza migrantino kiu faras sian vojon	22
<small>Nazigul Jusupova</small>	
La eksterlandaj ĉinoj: Longa rakonto	24
<small>Zhuang Guotou</small>	
Dentoj: Arkivoj pri homaj translokiĝoj	27
<small>Jenny Dare</small>	
"La historio de la homaro konsistas el sinsekvo de migradoj"	28
<small>Intervjuo kun Eva-Maria Geigl</small>	

30

ZOMO

"UNESKO proponis al mi la mondon"	30
<small>Retrospektivo de la laboro de Dominique Roger</small>	

40

IDEOJ

Malferma scienco: Tutmonda movado populariĝas	41
<small>Chérifa Boukacem-Zeghmouri</small>	
Fari sciencajn taksojn pli traveblaj	44
<small>Alex Holcombe</small>	

46

NIA GASTO

Latin-Ameriko: La ora epoko de dinosaŭroj	46
<small>Intervjuo kun Miriam Pérez de los Ríos</small>	

50

PLI DETALE

Ĵurnalismo: Danĝera profesio	50
---	----

Ĉefartikolo

Familioj elhejmigitaj de milito, improvizitaj tendaroj en la ĉirkaŭaĵo de urboj, postvivantoj de danĝeraj martransiroj – amaskomunikiloj kutimis bagateli bildojn de migrantoj, kiuj tro ofte reduktiĝas al arketipo de nuntempa malfeliĉo. Ĉi tiuj novaĵoj reflektas tre realajn situaciojn, kiel tiuj, kiuj nuntempe spertas civiluloj provantaj fuĝi el Afganujo.

La tragika flanko de migrado tamen malproksime resumas la kompleksan, multoblan kaj ŝanĝiĝantan realecon de ĉi tiu ĉefa fenomeno de la 21-a jarcento. En 2020, la Internacia Organizaĵo por Migrado (angle *IOM*) taksis, ke la nombro de internaciaj migrantoj tutmonde estis 272 milionoj. Ĉi tiuj homoj forlasis sian hejmlandon ne nur por fuĝi de perforto, naturaj katastrofoj aŭ efikoj de klimatsanĝiĝo – sed ankaŭ por studi, labori kaj krei novan vivon aliloke.

Ĉi tiu cifero, kiu daŭre kreskas, estas ofte ekspluatita de tiuj, kiuj uzas ĝin kiel politikan armilon, por argumenti, ke migrantoj – oportunaj kulpuloj pro timoj kaj ĉagrenoj de gastigantaj komunumoj – prezentas veran minacon. Ĉi tiuj timoj pligraviĝas dum pandemio, instigita de antaŭpensitaj nocioj kaj antaŭjuĝoj pri migrantoj, kiuj helpas kaŝi bone establitaĵojn datumojn – precipe ke populaciaj movadoj ĉefe okazas inter malalt- kaj mez-enspezaj landoj, kaj ke preskaŭ duono de ĉiuj migrantoj ne transiras landlimojn.

Ĉi tiuj antaŭjuĝoj ankaŭ nutras malakcepton, rasismojn kaj eĉ diskriminacion kontraŭ la novalvenintoj. Virinoj estas aparte punataj. Ĝuste por instigi kunvivadon kaj redukti tian diskriminacion, UNESKO starigis la Internacian Koalicion de Inkluzivaj kaj Daŭripovaj Urboj (angle *ICCAR*).

La organizo ankaŭ fervore memorigas nin, ke malantaŭ la sekaj statistikoj estas miloj da homaj destinoj, sennombraj rakontoj – foje teruraj, ofte feliĉaj – kaj la riĉeco de kultura miksaĵo, kiu estas parto de nia vivo kaj nia kolektiva historio.

Ĉu la esprimo migrado ankoraŭ signifas ion en niaj tutmondigitaj socioj, kiuj karakteriziĝas per intenseco de interŝanĝoj kaj vojaĝoj, kie "ie" estas nun atingeblaj por multaj homoj?

En *Le Métier à métriser*, la haitia verkisto René Depestre invitas nin reipensi la ideon de ekzilo mem: "La procezo de tutmondiĝo estas alvoko rezigni malmodernan kaj malaktualan kredon, ke, por havi identecon, oni devas resti hejme, flarante la kafaromon de sia avino."

Agnès Bardón

-El la angla esperantigis Jens Spillner (Germanio)

Rakontoj de MIGRADOJ



Sans titre VII, Polyptich detail, 2006 © Anabell Guerrero

▼ Detaloj de vizaĝoj kaj de manoj estas la nuraj identigaj eroj videblaj en la serio Voĉoj de la Mondo / Translokado (france Voix du Monde / Délocalisation), 2006, de la franca-venezuela artistino Anabell Guerrero.

Agnès Bardon

UNESKO

U nuafoje post multaj jaroj, la kreskado de la nombro de migrantoj malrapidiĝis en 2020. Tiun apenaŭan dekliniĝon klarigas precipe la vojaĝlimigoj ligitaj kun la pandemio de KOVIM-19. Ĉar dum pluraj jardekoj, la migraj fluoj senĉese pli densiĝas. En 2020, 281 milionoj da homoj vivis en lando kiu ne estis tiu de ilia naskiĝo. En 2000 ili estis 173 milionoj. En 1970, 84 milionoj.

Tiam kiel nun, oni foriras por fuĝi el malriĉeco, por konstrui vivon kiun oni esperas pli bona. Oni forlasas siajn familianojn por doni al si estontecon. La ĉefaj migradkoridoroj kiuj iom post iom estiĝis, ankoraŭ nun kunligas la disvolviĝantajn landojn kun la industriiĝintaj: Usono, Eŭropo, Rusia Federacio, aŭ ankaŭ Sauda Arabio.

Oni pli kaj pli foriras ankaŭ por eskapi el armitaj konfliktoj kaj el perfortoj. En 2020, la rifuĝintoj kaj azilpetantoj estis 12% de la tuta nombro de migrantoj, du jardekojn pli frue ili estis 9,5 %. En dudek jaroj, inter 2000 kaj 2020, la nombro de homoj trude ekziliĝintaj pro milito, politikaj krizoj aŭ persekutoj duobliĝis: de 17 ĝis 34 milionoj laŭ la Fako pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj. Ankaŭ la efikoj de la klimatsanĝiĝo ĵetas sur la alekzilajn vojojn kreskantan nombron da homoj eskapantaj akvomankon, malplifekundiĝon de la grundoj aŭ erodon de la marbordoj.

Fronte al tiu ĉi situacio, Unuiĝintaj Nacioj adoptis la Mondan pakton por sekuraj, ordaj kaj regulaj migradoj. Ĝia celo estas: plibonigi la vivkondiĉojn de la migrantoj sur la internacia nivelo kaj kuraĝigi la kunlaboron sur la migra kampo. Tiu kontrakto ankaŭ substrekas ke la ŝtatoj devas alporti helpon al migrantoj kies vojoj estas danĝeraj.

Ĉar ekspluatado, moneltrudo, perfortoj estas la sorto de multaj migrantoj, aparte la neleĝaj, kiuj estas sub la povo de hom-ŝakristoj. Iuj pagas tiun vojaĝon per sia vivo. Dum nur la unua kvaronjaro de 2021, 1 146 homoj mortis en la maro provante traveturi Mediteraneon.

En la gast-lando, por tiuj kiuj atingis ĝin, la realaĵo ofte estas for de la revita vivo: migrantoj ofte frontas antaŭjuĝojn, aŭ eĉ diskriminaciojn. En ekonomia kunteksto malboniĝanta, tuŝita de necerteco, alveno de novaj loĝantaroj foje estas spertata kiel minacaĵo, nutranta timojn kaj frustriĝojn.

Tiel pensi estas forgesi ke la realo estas pli kompleksa kaj nuancita ol ĝi ŝajnas. Certe multas la migrantoj, sed fakte ili estas nur 3,5 % de la tutmonda loĝantaro, for de la imaga cunamo kiun iuj penas priskribi. Cetere la granda plimulto el ili migras ene de sia kontinento. En 2020, preskaŭ la duono de ĉiuj migrantoj restadis en la mondregiono en kiu ili naskiĝis.

Tio estas ankaŭ preteratentata, ke la translokiĝoj de loĝantaroj apartenas al la historio de la homaro ekde ĝia origino. La plej antikva, laŭ nia kono, homa aŭ prahoma ĉeesto ekster Afriko datumas je du milionoj da jaroj.



Ŝanĝi la gazetistaran regardon al la migrantoj

La migradoj kaj la truditaj delokigoj estas inter la temoj la plej malfacile pritrakteblaj por la amaskomunikiloj. Ĝis tia grado ke la ĵurnalistoj kaj la informilaj redakcioj foje hezitas alpaŝi al tiuj kompleksaj kaj tiklaj demandoj.

Nova gvidilo de UNESKO, *Kiel Raporti pri Migrantoj kaj Rifuĝintoj: Manlibro por edukistoj pri ĵurnalismoj*, helpas la instruistojn trejnantajn pri ĵurnalismaj profesioj alpaŝi al tiuj temoj. Vera inform-mino, ĝi provizas ilin per miloj da rimedoj kun malfermita aliro, teoriaj vidpunktoj kaj kazo-studoj kolektitaj en ĉiuj mondregionoj por faciligi pli bonan pritrakton de la demandoj rilataj al migradoj, kaj estiĝi pli ekvilibran kaj pli bone informitan publikan debaton.


Ĝi proponas instru-unuojn pri diversaj aspektoj de la raportado pri la migradoj: ŝlosilvortoj, kunteksto, profesiaj defoj, plej bonaj agmanieroj, traŭmatoj (de la migrantoj kaj la rifuĝintoj, kaj ankaŭ de la ĵurnalistoj kiuj informas pri ili), translima kunlaborado kaj prezentado de la temoj. La tuto estis ellaborata de internacia grupo de esploristoj, instruistoj kaj komunikilaj profesiuloj.

La studentoj pri ĵurnalismo lernos per ĝi, ke raportoj pri migradoj postulas profesionan etikon, bonajn agmanierojn, faktojn kaj fidindajn fontojn. La jamaj ĵurnalistoj ĉerpos el ĝi ion kio povos plibonigi ilian komprenon de la kunteksto kaj trovi respondon pri diversaj problemoj.

-El la franca esperantigis Christian Lavarenne (Francio)

Kaj tio precipe estas forgesi ke kaŝitaj malantaŭ la sekaj statistikoj, ĉiam troviĝas homaj ekzistadoj, vivovojoj, foje dramoplenaj, ofte feliĉaj, kaj ke de tiuj kulturaj mikradoj naskiĝas fruktoplenaj mestiziĝoj, sukcesaj aventuroj en la mondo de komerco, de sporto, de muziko aŭ de scienca esplorado. En longedaŭra perspektivo, la kontribuo de alilanduloj ĝenerale montriĝas granda avantaĝo por la gastigaj societoj. Ne diras tion ĉi iu neregistara organizaĵo, sed la Konsilio de Eŭropo. En raporto titolita *La migradoj: kaptinda bonŝanco por la eŭropa disvolviĝo (2017)*, ĝi substrekas ke la kultura influo de migrantoj "havis grandan efikon sur novaj direktoj en arto, modo kaj kuirarto en Eŭropo, profite al la diverseco". ■

-El la franca esperantigis Christian Lavarenne (Francio)



© Alireza Tabouk - posterfortomorrow - 2017

▼ La libereco de moviĝo estas homa rajto, afiŝo verkita de la irana grafikisto Alireza Tabouk.

LA MIGRADOJ, EN CIFEROJ

272 milionoj
da migrantoj en la mondo en
2019

**3,5% de la tuta
monda loĝantaro**

52% estas viroj



**Ĉefaj deven-landoj de
la migrantoj:**

- Barato: 17,5 milionoj
- Meksikio: 11,8 milionoj
- Ĉinio: 10,7 milionoj

Unua cel-lando de migrantoj:
Usono

25,9 milionoj
da rifuĝintoj en 2018



41,3 milionoj da homoj
delokigitaj ene de sia propra lando
pro perfortoj aŭ armitaj konfliktoj
en 2020

**689 miliardoj da usonaj dolaroj
senditaj de migrantoj al sia antaŭa
hejmolando**

Ĉefaj landoj kiuj ricevas tian monon:

- Barato (78,6 miliardoj da usonaj dolaroj)
- Ĉinio (67,4 miliardoj da usonaj dolaroj)
- Meksikio (35,7 miliardoj da usonaj dolaroj)



Ĉefaj landoj de kie estas sendita la mono:

- Usono (68 miliardoj da usonaj dolaroj)
- Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj (44,4 miliardoj da usonaj dolaroj)
- Sauda Arabio (36,1 miliardoj da usonaj dolaroj)



Fonto: *Stato en 2020 de la migrado en la mondo*, Internacia Organizaĵo por Migrado (angle IOM).

Niĝeriaj migrantoj:

Serĉi revon ĉiakoste

Kial pli kaj pli da niĝeriaj junuloj decidas forlasi sian landon? Kreskanta senlaboreco, manko de oportunoj, altiro de idealigita Okcidento kaj nescio pri la danĝeroj de kontraŭleĝa migrado klarigas tiun amasan eliron.

Lanre Ikuteyijo

Profesoro pri sociologio kaj antropologio, Universitato Obafemi Awolowo, Ife, Niĝerio.

La niĝeria junularo estas unu inter la plej grandaj grupoj de migrantoj el landoj de la Tutmonda Sudo al Eŭropo. Kial tiuj junuloj decidas forlasi sian landon? Ĉu ili scias la danĝerojn kiujn ili trovos survoje? Tiuj demandoj estas la bazo de mia esploro, *Neregula Migrado kiel Strategio por Supervivo: Rakontoj de Junularo en Urba Niĝerio*, publikigita en 2019.

Efektivigita en kvar grandaj niĝeriaj urboj – Lagoso, Ibadano, Ife kaj Beninurbo – elektitaj pro siaj karakteroj rilate al

neregula migrado, la esploro celis 15-ĝis-35-jaraĝulojn. Ĉiuj intervjuatoj estis inklinaj al neregula migrado – ili estis aŭ senlaboruloj, aŭ en la lasta jaro de universitato, aŭ partoprenis en la deviga Nacia Junula Serva Korpuso.

Junuloj kiuj estis en unu aŭ pli el tiuj situacioj esprimis timon pri la estonteco kaj komprenis migradon kiel strategion por supervivo, por fuĝi el ekzistado de malriĉeco kaj senpoveco. La esploro ankaŭ inkluzivis junulojn kiuj forlasis la landon kaj revenis – ĉu propravole, ĉu per deporto.

“

En 2020, 53,4% de la niĝeriaj junuloj estis senlaboruloj

La unua eltrovo estis, ke la plimulto de tiuj junuloj ne sciis pri formalaj, laŭleĝaj enmigradaj procedoj. Pli ol duono de ili ne posedis validan pasporton, kiu estas la minimuma postulo por sekura kaj laŭleĝa internacia migrado. Tamen, ili sciis, ke eblas kontraŭleĝe migri aŭ, kiel oni diras en Niĝerio, “piede vojaĝi Eŭropon”. La plimulto inter ili konis iun kiu kontraŭleĝe forlasis la landon, per malveraj vojaĝ-dokumentoj aŭ per servoj de homo-ŝakristoj aŭ kontrabandistoj.

La ĝenerala sento estis, ke “la rezulto pravigas la rimedojn”. La plimulto de la junuloj rigardis neregulan migradon ne kiel krimon, sed kiel praktikan solvon kiu estas “lerta” aŭ “inteligenta”. Ilia forta volo migri signifas, ke ili malsukcesis vidi la riskojn de kontraŭleĝa vojaĝo, kio faras ilin facilaj predoj por karteloj de homo-ŝakrado.



© Osama Hajjaj / Cartoon Movement

▼ Afrika enmigrado al Eŭropo, de la jordanja karikaturisto Osama Hajjaj, Karikatura Movado (angle Cartoon Movement), tutmonda platformo por karikaturaj en Nederlando.

Idealigita kompreno pri la transmara vivo

“Imagita Okcidento” – idealigita rigardo de vivo en okcidentaj landoj – ofte estas ĉe la koro de enmigra plano. Respondantoj ĝenerale kredis, ke tiuj kiuj sukcese migris, ĝuas pli bonan vivkvaliton. “Tiuj kiuj migris eksterlanden, ofte vivas multe pli bone ol

ni en Niĝerio. Ili havas konstantan elektran povumon, pli bonan veteron, manĝas pli bone kaj estas relative sekuraj”, diris Sabato*, 29-jaraĝa senlabora virino.

Ilia sinteno ankaŭ estis influita de radio, televido, muziko kaj aliaj popularaj kulturaj kaj amaskomunikaj prezentoj pri la celitaj landoj. “Estinda tie”, la populara diraĵo pri homoj kiuj vizitis

aliajn kontinentojn, speciale Eŭropon kaj Amerikon, altigas socian statuson. Reveninta migranto en socia kunveno aldonas ŝikecon kaj prestiĝon.

Informoj pri celitaj landoj – ofte troiga kaj malpreciza – venas de neformalaj fontoj kiel amikoj, parencoj kaj sociaj retejoj.

Afriko: Repo por atentigi pri danĝeroj de neregula migrado

La filmeto *Prévenue* (Avertita), publikigita okaze de la Internacia Tago de Migrantoj la 18-an de decembro 2020, estis granda sukceso en Senegalo. Ĝi montras la repiston Xuman avertante la hiphopan artiston Mamy Victory pri danĝeroj de migrado per neregulaj vojoj.

La filmeto estas parto de la projekto *Povigi Junularon en Afriko per Amaskomunikiloj kaj Komunikado*, kampanjo de UNESKO en Okcidenta kaj Centra Afriko. La celo estas diskonigi al junuloj justajn kaj ĝustajn informojn pri migrado kaj diskriminacio suferita de migrantoj dum la pandemio de KOVIM-19.

La du-semajna kampanjo enhavis filmetojn, animaciojn, aŭdeblajn kaj videblajn mesaĝojn en sociaj retejoj kaj lokaj amaskomunikiloj de ok landoj – Kameruno, Eburbordo, Ganao, Gvineo, Malio, Niĝero, Niĝerio kaj Senegalo. Krom la franca kaj la angla, oni kreis enhavojn en dudek oficialaj kaj naciaj lingvoj – inkluzive de la baŭlea, fantea, mandinka, joruba kaj volofa.

La filmetoj estis rezultoj de du skribaj atelieroj pri la temo migrado, organizitaj en Dakaro, Senegalo kaj Niameo, Niĝero, en oktobro kaj novembro 2020. Per kunlaboro de Senegala Asocio pri Urba Afriko-kulturo (angle *Senegal's Association Africulturban*) kaj Niĝera Forumo pri Tutmonda Agado (angle *Niger's Global Actions Forum*), partoprenis en la ateliero ĵurnalistoj, spertuloj, artistoj kaj migrantoj. La kampanjo ricevis ĉirkaŭ 6 milionojn da vidoj kaj 300 mil engaĝiĝojn ĉe ciferecaj platformoj dum dek kvin tagoj.

-El la angla esperantigis Rafael Lima (Brazilo)



▼ Filmeto de *Prévenue*, kun repistoj Xuman kaj Mamy Victori, kiuj avertis pri danĝeroj de kontraŭleĝa migrado. La filmeto ricevis 235 mil vidojn ĉe YouTube-paĝo de UNESKO/Dakaro.

Endemia senlaboreco

La niĝeria ekonomio kaj la vasta senlaboreco inter junuloj puŝas homojn serĉi pli bonajn oportunojn, laborpostenojn kaj sekurecon. En 2020, la Nacia Oficejo pri Statistikoj raportis, ke 53,4% de la junuloj estis senlaboruloj. Laŭ datumo pri 2021 el Monda Horloĝo pri Malriĉeco (angle *World Poverty Clock*), ĉirkaŭ 86 milionoj da niĝerianoj, 41% de la loĝantaro, vivas en ekstrema malriĉeco.

Tiuj ekonomiaj realaĵoj kune kun aliaj aferoj, kiel politika malstabileco, kreskantaj ondoj de konfliktoj – kaj nuntempe efikoj de la pandemio de KOVIM-19 – kondukis al plialtigo de la kvanto de junuloj en kelkaj situacioj, kiuj forlasas Niĝerion por aliaj landoj rigardataj kiel pli promesplenaj.



La plimulto de la junuloj rigardis neregulan migradon ne kiel krimon, sed kiel praktikan solvon “inteligentan”

La plimulto de la respondantoj kiuj kontraŭleĝe forlasis Niĝerion diris, ke ili tute ne sciis kion ili alfrontos. Multaj inter tiuj kiuj revenis, raportis terurajn rakontojn pri siaj provoj atingi Eŭropon. Jessica, 30-jaraĝa virino kiu revenis el Italio, rakontis, ke ses virinoj kiuj vojaĝis kun ŝi, mortis en la maro. Cent sesdek virinoj estis en tri ŝipoj. Du ŝipoj malfunkciiĝis meze de la maro kaj ses virinoj mortis antaŭ alveno de savo. La aliaj virinoj estis liveritaj al dungantoj, kontraŭleĝaj aŭ ne, kiam la ŝipo finfine albridiĝis ĉe Hispanio.

Kresko kaj evoluigo de ĉiu lando forte dependas de evoluigo de homa kapitalo, ofte per trejnado kaj edukado. La publika eduka sistemo en Niĝerio suferas pro konstantaj strikoj de instruistoj kaj aliaj laboristoj. Tio kontribuas al perdo de konfido en tiuj institucioj, kaj al malorganizado de edukado. Kiel rezulto,



▼ “Mi devas kontroli ĉion tion”, de Damien Glez, unu inter la dek karikaturaj de la franca-burkina karikaturisto por la kampanjo de UNESKO Povigi Junularon en Afriko per Amaskomunikiloj kaj Komunikado, 2020.

junuloj serĉas studoportunojn ekster Niĝerio.

Klerigi junulojn pri kontraŭleĝa migrado

Tio ofte kaŭzas alian formon de migrado, kiam studentoj preferas resti en la celitaj landoj, por trovi pli bonan vivon post la fino de la studoj, ol reveni hejmen. Jessica estis trompita de ŝakrantoj kiuj promesis al ŝi daŭran edukadon eksterlande. “Dum ferioj post la unua jaro de mezlernejo, familia amiko diris, ke li kondukus min al Italio por daŭrigi mian edukadon. Miaj gepatroj cedis al la ideo ĉar ili pensis, ke en Italio mia edukado estos pli vasta”. Ŝi poste malkovris, ke tio estis trompo, kaj revenis hejmen.

Kompreni kial tiuj junaj niĝerianoj emas migri, povas helpi nin elpensi politikajn solvojn. Niĝerio devas malgrandigi malegalecon, krei laborpostenojn kaj garantii sekurecon de la loĝantaro, tiel ke junuloj ne volus forfuĝi. Programoj kaj aktivaj devus klerigi junulojn pri la danĝeroj kaj trompoj de neregula migrado – klarigante kaj la vivon de neregula migranto, kaj la realecon de

loĝado en la celitaj landoj. Instruplano por mezlernejoj devus inkluzivi informojn pri rajtoj de migrantoj kaj procedoj de internacia migrado.

Niĝerio devas antaŭenigi kaj konstrui junul-amikan ekonomion, kie entreprenemaj junuloj ricevu la bezonatajn financajn kaj praktikajn subtenojn. Tiuj agoj estas esencaj por garantii, ke la lando retenu la armeon da lertecoj kaj kapabloj enkorpoigitan en ĝia junula loĝantaro. ■

-El la angla esperantigis Rafael Lima (Brazilo)

*Ĉiuj nomoj estis ŝanĝitaj por protekti la identecon de tiuj kiuj partoprenis la esploron.

Nove aperintaj esploroj plejparte malvalidigas sufiĉe disvastiĝintajn nociojn pri afrikaj rifuĝintoj: ke ili ĉiuj estas potencialaj kandidatoj por enmigrado en Eŭropon, Nord-Amerikon aŭ Azi-Pacifikon, ke la gastigantaj socioj estas ĉiam malamikaj al migrantoj, ke la rifuĝintoj neeviteble kreos konkurencon por la malabundaj laborpostenoj bezonataj de la civitanoj en la gastigantaj landoj.

Rifuĝintoj: Moviĝi preter la antaŭjuĝoj

Alexander Betts

Profesoro pri Devigita Migrado kaj Internaciaj Aferoj ĉe la Universitato de Oksfordo, Britio.

La kvanto de homoj elradikigitaj pro persekuto, konfliktoj kaj aliaj krizoj estas pli granda hodiaŭ ol iam ajn post la Dua Mondmilito: entute 82,4 milionoj, el kiuj 26 milionoj transiris landlimon kiel rifuĝantoj. Tamen, meze de la politikigo de azilo kaj enmigrado, kaj en riĉaj kaj en malriĉaj landoj, la rifuĝintoj devas alfronti malfacilaĵojn por ricevi internacian protektadon.

Parto de la problemo devenas el misinformado. Amaskomunikiloj kaj politikistoj de tempo al tempo manipulas la publikan konscion, kaj montras la rifuĝintojn kiel neeviteblan ĝenon por la gastigantaj komunumoj.

En mia ĵus aperinta libro *La valoro de rifuĝintoj: kiel elradikiĝintaj homoj povas kontribui al ekonomia prospero*, publikigita en 2021, mi proponas politikojn pri rifuĝintoj bazitajn sur faktoj. Surbaze de ampleksaj kvalitataj kaj kvantaj esploroj en Orienta Afriko, inkluzive de originala enketo al pli ol 16 000 rifuĝintoj kaj membroj de la gastigantaj komunumoj en kampadejoj kaj urboj en Etiopio, Kenjo kaj Ugando, mi argumentas, ke se oni starigas agadojn kiuj celas inkluzivi ĉiujn, estas eblo por

la rifuĝintoj fariĝi kaj esti perceptataj kiel kontribuantoj al la gasto-komunumoj. Mi utiligas tiun esploron por alfronti kvin popularajn mitojn pri la rifuĝintoj en Afriko.

Moviĝemo: “Ĉiuj rifuĝintoj en Afriko venos al Eŭropo”

En la riĉaj mondopartoj estas disvastiĝinta ideo, ke ĉiuj rifuĝintoj volas veturi al Eŭropo, Nord-Ameriko aŭ Azi-Pacifiko. La realo de la moviĝemo de rifuĝintoj estas tute alia. Mez-riĉaj kaj malriĉaj landoj gastigas 86% el ĉiuj rifuĝintoj, kaj naŭ el ĉiu deko da ĉefaj landoj kiuj gastigas rifuĝintojn, troviĝas en la sudo de la terglobo.

Estas vero, ke la aspiroj translokiĝi al riĉaj landoj estas disvastiĝintaj. Tamen, multaj komprenas, ke tio estas nerealisma. Ekzemple, en Adis-Abebo, pli ol 95% el ĉiuj rifuĝintoj planas translokiĝi al alia lando, sed pli ol duono agnoskas, ke tio estas neverŝajna okazo en proksima estonteco.

En Kenjo, malgraŭ tio, ke signifa ondo de ĉiuj rifuĝintoj ja translokiĝas ĉiujare,

plejparto de la translokiĝoj estas enlandaj. Kaj tiuj kiuj foriras eksterlanden, iras plejparte al aliaj najbaraj orient-afrikaj landoj, ekzemple Ugando, aŭ pere de organizitaj relokiĝoj por repatrujigo aŭ re-setligo. Eta ondo, multe malpli ol 1% jare, translokiĝas internacie al Eŭropo kaj al aliaj riĉaj landoj.

La rezulto estas, ke ni devas agnoski, ke plejmultaj rifuĝintoj estas kaj daŭre estos gastigataj de mez-riĉaj kaj malriĉaj landoj, ene de la mondregionoj de kiuj ili devenas.

Socia Kohero: “Gastkomunumoj estas neeviteble malamikaj al rifuĝintoj”

Estas ofta supozo ke ricevantaj komunumoj neeviteble rigardas la ĉeeston de rifuĝintoj kiel ŝarĝon. Tamen, surbaze de la adekvataj politikoj, rifuĝintoj foje estas rigardataj pozitive. En kelkaj malproksimaj limregionoj, la ĉeesto de rifuĝintoj kaj humanitaraj organizoj povas esti unu el tre malmultaj fontoj de laborpostenoj kaj merkatoj.

Por la loka turkana komunumo de Kenjo, ekzemple, la ĉeesto de la rifuĝejoj en Kakuma prezentas merkaton por iliaj brulligno kaj brutaro, eblecon labori, kaj aliron al lernejoj kaj kuracejoj.



▼ Virino turkana (maldekstre) kaj ŝia amikino, rifuĝinto el Sud-Sudano, ĉe la Integrita Setlejo Kalobeyei, en nordokcidenta Kenjo.

Tra niaj fokusaj landoj, ni trovis, ke plej gravas por gastigaj komunumoj la kvalito de ekonomia interago. La homoj kun la plej pozitivaj sintenoj al rifuĝintoj tendencas esti tiuj kiuj profitas ekonomie el ilia ĉeesto. Ni ankaŭ trovis, ke kontakto faras diferencon – pli altaj niveloj de intergrupa interagado forte rilatas al pli pozitivaj gastigaj komunumaj sintenoj, precipe en urboj. Krome, la sintenoj de la plej multaj homoj al rifuĝintoj estas forte korelaciitaj kun tiuj tenataj de iliaj familioj kaj najbaroj – kio sugestas ke sintenoj estas formitaj ene de apudaj komunumoj.

Ĉio ĉi implicas, ke gastigaj komunumoj povas bonvenigi rifuĝintojn, kaj ekzistas politikaj agadoj kiuj povas esti adoptitaj por plifortigi inkluzivemon. Simple, rifuĝint-politiko devas ankaŭ subteni gastigajn komunumojn, kaj la rilaton inter rifuĝintoj kaj gastigantoj.

Rajto al Laboro:

“Gastiglandoj suferas perdon lasante rifuĝintojn labori”

Rifuĝintoj havas soci-ekonomikajn rajtojn laŭ internacia leĝo pri rifuĝintoj kaj homaj rajtoj. Ĉi tiuj inkluzivas la rajton labori kaj moviĝ-liberecon. Tamen, multaj rifuĝint-gastigantaj landoj trudas restriktajn al tiuj

rajtoj. Ili faras tion ĉar ili kredas, ke permesi al rifuĝintoj labori kreas streĉitecon ene de la gastiga komunumo.

La rezulto estas, ke rifuĝintoj en landoj kiel Kenjo kaj Tanzanio devas resti dum multaj jaroj en rifuĝejoj, sen aliro al la labormerkato. Evidentiĝas ke tio havas negativajn sekvojn por la rajtoj kaj bonfarto de rifuĝintoj, kaj ke tio ankaŭ povas esti malbona por gastigaj landoj.

Ugando estas unu el la malmultaj afrikaj landoj kiuj permesas al rifuĝintoj labori kaj elekti sian loĝlokon. Ĉi tiu aliro havas gravajn avantaĝojn por rifuĝintoj. Rifuĝintoj en Ugando havas dek ses procentojn pli altajn enspezojn ol rifuĝintoj en la najbara Kenjo.

Estas pruvoj, ke tia aliro profitigas ne nur rifuĝintojn, sed ankaŭ civitanojn de la gastiganta lando. Ekzemple, en Kampalo, la uganda ĉefurbo, ni trovis, ke proksimume 21% de la rifuĝintaj familioj havas komercon kiu dungas almenaŭ unu alian personon, kaj ke 40% de iliaj dungitoj estas ŝtatanoj de la gastiganta lando. Por multaj ugandanoj, rifuĝintoj kontribuas al la ekonomio kiel produktantoj, konsumantoj kaj entreprenistoj.

La konkludo estas, ke ni devas aktive antaŭenigi – kaj instigi – la rajton kaj ŝancon por rifuĝintoj labori, ne gravas kie ili estas en la mondo. →

Ĉu migrantoj, rifuĝintoj, aŭ delokitoj?

Migranto: Ne ekzistas laŭleĝe akceptita difino de la termino “migranto” je internacia nivelo. Laŭ Internacia Organizo pri Migrado de Unuiĝintaj Nacioj, ĝi rilatas al “ĉiu persono kiu loĝas for de sia kutima loĝloko, ĉu ene de lando aŭ trans internacia limo, sendepende de la jura statuso de la persono; ĉu la movo estas nevola aŭ propravola; kiuj estas ĝiaj kaŭzoj aŭ, kiom longa estas la restado.” Tamen, estas kutimo inkluzivigi certajn kategoriojn de mallonge restantaj migrantoj, kiel laŭsezonaĵaj agrikulturaj laboristoj, kiuj migras por plantado aŭ rikolto.

Rifuĝinto: Kiel difinite de la Konvencio de Ĝenevo de 1951, tiu ĉi termino validas por “ĉiu persono kiu, pro pravigebla timo je persekuto pro raso, religio, nacieco, membreco de aparta socia grupo aŭ politika opinio, troviĝas ekster la lando de sia nacieco, kaj estas nekapabla aŭ, pro la menciita timo, ne volas reveni al ĝi”.

Delokitoj: Personoj kiuj estis devigitaj aŭ perfortitaj fuĝi aŭ forlasi siajn hejmojn aŭ lokojn kie ili kutime loĝis, precipe rezulte aŭ kun la celo eviti la efikojn de armita konflikto, situaciojn de ĝeneraligita perforto, malobservojn de homaj rajtoj aŭ naturajn aŭ homfaritajn katastrofojn. Ĉi tiu difino kovras kaj internan kaj transliman delokiĝon.

Azilpetanto: Individuo kiu serĉas internacian protekton. Laŭ la Agentejo por Rifuĝintoj de UN, la termino estas uzata por difini “iun, kies peto pri protekta enloĝado ankoraŭ devas esti traktita.”

—El la angla esperantigis Orlando E. Raola (Usono)

Fonto: Terminaro pri Migrado, Internacia Organizo pri Migrado



© UNHCR / Samuel Otiemo

▼ Maambi Samil, 24-jaraĝa rifuĝinto el DR Kongo, kunkudras maskojn en sia malgranda negoco ene de la kenja Kakuma rifuĝejo.

Urboj kontraŭ tendaroj: “Rifuĝintoj ĉiam fartas pli bone en urboj ol en tendaroj”

Spekulante la pli larĝan tutmondan tendencon al urbigo, la plej multaj rifuĝintoj nun estas en urboj. Tamen, ĉi tio ne estas la kazo en sub-sahara Afriko, kie la absoluta plimulto de registritaj rifuĝintoj troveblas en tendaroj. Laŭ UNHCR, la Agentejo por Rifuĝintoj de UN, nur 16% de la rifuĝintoj en Kenjo estas en la ĉefurbo, Najrobo; 6% de tiuj en Ugando estas en Kampalo; kaj 4% de tiuj en Etiopio

estas en ĝia ĉefurbo, Adis-Abebo. La urba-kampara distribuo reflektas registarajn restriktiojn, la relativan haveblon de asistado kompare kun dungado, kaj la preferojn de rifuĝintoj.

La konsisto de urbaj kaj tendaraj loĝantoj estas ĝenerale malsama. Tiuj en urboj tendencas esti pli maljunaj kaj viraj, kaj tiuj en tendaroj tendencas esti pli junaj kaj inaj. Foje rifuĝintoj disigas siajn familiojn: tiuj kapablaj labori moviĝas al la grandaj urboj, kaj tiuj kiuj bezonas asistadon aŭ kiuj havas famili-prizorgajn respondecojn, restas en la tendaroj.

Nia esplorado en Orienta Afriko rivelas tri ŝlosilajn punktojn. Unue, rifuĝintoj enspezas pli, posedas pli, kaj laboras pli en la urbo, sed ne nepre estas pli feliĉaj, pli sanaj aŭ pli bone nutrataj ol tiuj, kiuj loĝas en tendaraj medioj. Due, gastigaj komunumoj estas ĝenerale pli pozitivaj al rifuĝintoj en kamparaj ol urbaj medioj. Trie, ekzistas provizora kaj permanenta movadoj inter tendaroj kaj urboj ambaŭdirekte.

La konkludo de ĉi tiuj ideoj estas, ke nek urba nek kampara loĝejo estas esence pli bona por rifuĝintoj ol la alia. Ĉiu eblo



representas limigitan elekton kun relativaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Politikaj decidoj pri rifuĝintoj devas koncentriĝi sur plibonigo de aliro al rajtoj kaj en la urbaj kaj en la kamparaj kunteksto.

Politiko

“Asistado por rifuĝintoj estas tute humanitara”

Protekto kaj asistado de rifuĝintoj ofte estas rigardataj kiel sole humanitaraj agoj. Internaciaj juro kaj lobiado certe

Enmigrantaj Nobel-premiitoj gvidas la vojon



Ekde 1969, kiam la Nobel-Premio pri Ekonomiko estis aljuĝita, la plimulton de tiuj Nobel-premiitoj ricevis instituciojn en Usono. Tamen, la sciencistoj malantaŭ la avangarda esplorado ofte estis enmigrintoj el la tuta mondo. El la 281 premiitoj, kiuj estis ekskluzive aligitaj al la venkantaj usonaj institucioj, 87 naskiĝis eksterlande, laŭ informoj de la Nobelpremia Fondaĵo.

Ĉi tiu tendenco povas esti observebla ankaŭ en aliaj landoj. Ekde 1969, 15 el 45 premiitoj reprezentantaj instituciojn en Britio naskiĝis eksterlande. La plej granda nombro da eksterlandaj premiitoj troveblas en Svislando, kun ok eksterlande-naskitaj premiitoj kaj sep svis-devenaj premiitoj. Landoj, kies institucioj troveblas inter la dek plej elstaraj sen la helpo de enmigrintaj sciencistoj, estas Japanio, kun 15 ne-enmigrintaj premiitoj, kaj Svedio, kun ok.

La alta procento de enmigrintaj kaj elmigrintaj Nobel-premiitoj povas ĉefe esti atribuita al la fakto, ke esplorinstitucioj allogas sciencistojn el la tuta mondo. Laŭ la Scienca Raporto de UNESKO de 2021, la G20-landoj enhavas preskaŭ 89 procentojn de la monda esploristaro (en plentempaj ekvivalentoj).

La plej grandaj frakcioj troviĝas en Eŭropa Unio (23,5 procentoj), Ĉinio (21,1 procentoj), kaj Usono (16,2 procentoj). En kelkaj kazoj, la kvanto de esploristoj kreskis pli rapide ol esplor-elspezoj, rezultigante lukton por projekto-financado. Ĉi tio povas konduki al talento-elfluo.

-El la angla esperantigis Orlando E. Raola (Usono)



86% de la rifuĝintoj estas gastigataj de malriĉaj kaj mez-riĉaj landoj

ludas gravan rolon en formado de protekto de rifuĝintoj. Tamen, estas ankaŭ grave rekonigi ke asistado al rifuĝintoj okazas en la kunteksto de kompleksa kaj ofte ambigua politiko.

La politiko pri rajtoj de rifuĝintoj estas evidenta, se ekzameni kio instigas eĉ la plej progresemajn kaj malavarajn rifuĝint-akceptantajn landojn. Ekzemple, la vaste laŭdata memstara politiko

de Ugando devas esti komprenata en historia aŭ politika kunteksto. Fakte, ĝi ne estas lastatempa kreaĵo, ĝi aperis laŭlonge de la tempo kun la subteno de sinsekvaj prezidantoj.

La konkludo estas, ke internaciaj humanitaraj organizoj devas esti konsciaj pri la politika kunteksto en kiu rifuĝinto protekto okazas. Prefere ol simple fidi je lobiado, malsamaj strategioj kaj instigoj estas necesaj por antaŭenigi la rajtojn de rifuĝintoj en malsamaj landoj. ■

-El la angla esperantigis Orlando E. Raola (Usono)

Kun pli ol 3 000 kilometroj da marbordo kaj ekosistemoj aparte vundeblaj al la efkoj de klimatsanĝiĝo, Peruo estas unu el la landoj en la mondo kie naturaj eventoj kaj homa moviĝemo forte rilatiĝas.

Peruo alfrontas pliigon de klimataj migrantoj

Laura Berdejo

UNESKO

Inter 2008 kaj 2019, ĉirkaŭ 656 000 el la 33 milionoj da loĝantoj de Peruo estis devigitaj translokiĝi pro naturaj katastrofoj, laŭ la Centro por Superrigardo de la Internaj Translokiĝoj (angle *IDMC*). Oni kalkulas, ke en 2100, la riskoj pro tiaj movadoj povus atingi senprecedencajn nivelojn, pro la atendata

eksplosa kresko de la ofteco kaj intenseco de mediaj danĝeroj.

“La magia vorto ĉi tie estas *huaico*”, klarigas Liliana Márquez, kameraisto de televida kanalo en la ĉefurbo Limo. “Tiel ni nomas la fulmajn inundojn kaŭzitajn de pluvegoj, kiuj originas el la fenomeno *El Niño*, preskaŭ ĉiun someron. Ĉi tiuj nun ripetigaĝas en lando, kie la unua grava populacia movado asociita al klimato okazis en la dekoka jarcento, kiam la

rivero Zaña superfluis kaj la tuta urbo devis migri.”

La t.n. Suda Oscilado de *El Niño* (angle *SOEN*) estas la plej signifoplena pelilo de natura klimata ŝanĝebleco en Peruo. Karakterizita de eventoj de varmigo (*El Niño*) kaj malvarmigo (*La Niña*) de la temperaturo de la oceana surfaco en Pacifiko, la fenomeno kaŭzas atmosferajn ŝanĝojn, kiuj povas profunde influi la klimaton, precipe pluvojn.



Ĝia plej freŝa marborda okazo, en 2017, kaŭzis ke preskaŭ 300 000 homoj estis delokitaj. Sed preter la fenomeno *El Niño*, ĉiu el la tri ekosistemoj de Peruo estas submetita al specifaj riskoj kapablaj kontribui al amasaj migraj ondoj.

Kreskas naturaj riskoj

Dum la loĝantoj de la marbordo *Costa*, la regiono kie koncentriĝas la plej granda parto de la loĝantaro kaj ekonomio de Peruo, suferas la plenajn efikojn de *ENSO*, ili ankaŭ estas trafataj de ripetiĝantaj sekecoj, periodoj sen pluvo kaj, laŭ pli malgranda mezuro, altaj kaj ekstremaj temperaturoj, arbaraj incendioj kaj fortaj ventoj.

En la altebena regiono nomata *Sierra* (Montaro), la plej multaj meteologiaj danĝeroj estas ligataj al akvo, kvankam ankaŭ superregas la elmeto al altaj temperaturoj kaj ekstreme varmecoj en iuj lokoj, kaj ekstreme malvarmaj kaj frostaj temperaturoj en lokoj kiel Kusko.

Unu el la plej grandaj danĝeroj ĉi tie estas la malkresko de glaĉeroj, kies akcelado minacas unu el la ĉefaj dolĉaj akvofontoj de la lando kaj povus kaŭzi la migradon de dudek ok procentoj de la loĝantoj de la altebenaĵoj.

La regiono de la pluvarbaro *Selva* spertas kreskantan nombron da grandskalaj inundoj. Ĉe la alia ekstremo, estas severaj sekecoj, riverbordaj kolapsoj, erozio, senarbarigo kaj la riskoj de ekstreme varma streĉo.

En lando, kie la indikilo de malriĉeco estas pli ol dudek procentoj, kaj kie sociaj malegalecoj kreskis konsiderinde pro la pandemio, ĉi tiuj mediaj minacoj pli akcentas la sociekonoman vundeblecon de la loĝantaro.

Laŭ taksado farita en 2021 de la Potsdama Instituto por Esplorado de la Klimatefiko (angle *PIK*), kaj la Internacia Organizo pri Migrado, duono de la nacia teritorio de Peruo estas elmetata al ripetiĝantaj danĝeroj, kaj triono de la loĝantaro loĝas en malsekura spaco. Pli ol 9 milionoj da homoj estas submetataj al pluvegoj, inundoj, fulmaj inundoj kaj terglititoj, 7 milionoj al malaltaj kaj tre malaltaj temperaturoj, kaj preskaŭ 3,5 milionoj al sekecoj.

En la plej malbona kazo de mondvarmiĝo de pli ol 4°C antaŭ 2100, la anda lando alfrontus tri gravajn minacojn, kiuj povus kaŭzi delokiĝon de dekmiloj da homoj: ekstreme varma streĉo en la amazona regiono, la preskaŭ totala fandiĝo de glaĉeroj en Andoj, kaj pli intensaj okazaĵoj de

El Niño, kiuj endanĝerigus marbordajn populaciojn.

Internaj delokiĝoj

En Peruo, migrado – ĉu permanenta aŭ portempa, interna aŭ ekstera – ĉiam ekzistis historie. Tradicie malpli multaj homoj migris al la lando ol tiuj, kiuj foriris kun la celo plibonigi siajn laborajn, sociajn aŭ edukajn perspektivojn, kaj, ĉiufoje pli ofte, por eskapi el mediaj danĝeroj.

“Ĉi tiuj historiaj fluoj rezultigis fortajn migradajn retojn tra la lando, kiuj tiras novan migradon al urboj kaj al la marborda regiono kaj pliiĝas mensendojn al kamparaj regionoj”, notas la *IOM*.

Klimataj migrantoj emas moviĝi ĉefe ene de la landlimoj, kie la dinamiko dependas de sociaj kondiĉoj: aĝo (junuloj foriras pli ofte), malriĉeco (malriĉaj homoj pli probable estos migrantoj) kaj sekso (viroj estas iom pli moviĝemaj ol virinoj).

Enloĝante landon de ekstremaj pejzaĝoj kaj klimatoj, la homoj de Peruo disvolvis diversajn adaptiĝajn strategiojn por trakti danĝerojn renkontatajn kie ili loĝas. En la marborda regiono, fiŝkaptistoj moviĝas laŭ la marbordo, depende de la havebleco de maraj resursoj determinita de *SOEN*. Dume, kamparanoj en Piuro (Piura), en la nordo de la lando, migras



© Greenpeace/Daniel Beltra

▼ Bildoj de la glaĉero Yanamarey en la montaro Cordillera Blanca prenitaj en 1997 (maldekstre) kaj 2004 (dekstre) montras, ke ĝi signife retiriĝis en nur sep jaroj.

portempe dum periodoj de sekeco por diversigi siajn enspezfontojn.

En la Altebenaĵo, la efikoj de klimatsanĝiĝo akcelis la historie grandajn fluojn de migrantoj okazigitajn pro malvarmondoj kaj frosta vetero, akvomankoj kaŭzitaj de glaĉerretiriĝo kaj ŝanĝoj en pluvokvantoj. En la pluvbarbara regiono, kamparanoj migras ĉefe kiel provizora kaj antaŭgarda rimedo dum la pluvsezono, por mildigi manĝomalsekurecon.

Multaj migrantoj havas neniun elekton krom transloĝiĝi en lokojn, kiuj ankaŭ estas elmetataj al multnombraj danĝeroj, kiel riverfluejoj, inundebenaĵoj kaj akvostreĉitaj montetoj en la ĉirkaŭaĵoj de urboj. "Tia katastrofa delokiĝo povas okazigi psikosocian ŝarĝon al homoj, kiuj perdis siajn vivrimedojn kaj havaĵojn, inkluzive hejmojn kaj aliajn infrastrukturojn", rimarkigas la IOM.

En ĉi tiu kunteksto, la rolo de amaskomunikiloj en la mastrumado de klimata delokiĝo estas ĉiam pli grava. "La viktimoj de la fulminundoj de 2017 ankoraŭ loĝas en tendoj en Limo, tri jarojn poste", atentigas Márquez.

"Estas kreskanta intereso pri la homaj vivhistorioj malantaŭ klimata migrado", rimarkigas Pablo Escribano, specialisto pri Migrado, Medio kaj Klimatsanĝiĝo en la Regiona Oficejo de IOM por Centrameriko, Nord-Ameriko kaj Karibio.

"Ĉi tiuj vivhistorioj gravas ĉar ili alproksimigas la spektantarojn al la realeco de la homoj, kiuj estas trafitaj de klimatsanĝiĝo kaj devigita migrado", li aldonas.

Tutmonda fenomeno

La kresko de klimata migrado en Peruo – kiel en aliaj landoj kun altaj indikiloj, kiel Bangladeŝo, Fiĝioj, Ganao kaj Tanzanio – estas parto de tutmonda tendenco. En aprilo 2021, la Alta Komisiito por Rifuĝintoj de Unuiĝintaj Nacioj (AKRUN), la agentejo pri rifuĝintoj de UN, publikigis raporton montrantan, ke dum la pasinta jardeko klimataj eventoj ekigis averaĝe 21,5 milionojn da novaj delokiĝoj ĉiujare, pli ol duoble pli ol la delokiĝoj kaŭzitaj de konfliktoj kaj perforto.

Laŭ raporto de la menciita IDMC en 2021, 30,7 milionoj da homoj tra la mondo estis delokitaj pro geofizikaj kaj veterilataj katastrofoj en 2020. Meteologiaj eventoj reprezentis naŭdek ok procentojn de prokatastrofa delokiĝo.



CC BY 2.0 photo by the Ministry of Defence of Peru

▼ Evakuado de viktimoj de El Niño en la regiono Piuro, en la nordokcidento de la lando, kie pluvegoj kaŭzis la delokiĝon de ĉirkaŭ 300 000 homoj en 2017.

"Nia raporto montras ankaŭ, ke plej multaj homoj delokitaj pro ĉi tiuj katastrofoj restas en sia hejmlando", klarigas Alexandra Bilak, direktoro de IDMC. Ŝi timas, ke ĉi tio "plue pligravigos sociekonomajn malegalecojn".

Organizita respondo

"La raporto PIK-IOM metas la pruvojn sur la tablon", notas Johan Rockström, direktoro de PIK. "En Peruo ni vidas la efikojn de la maniero kiel klimatsanĝiĝo kaj ekosistema degenerado malplibonigas la riskojn de homa delokiĝo kaj migradoj, kiuj jam okazas nun je 1,2°C da mondvarmiĝo".

"Konsiderante, ke Peruo kundividis siajn ekosistemojn – Sierra, Costa, Selva (montoj, marbordo, arbaroj) – kun siaj najbaroj, iuj realaĵoj ankaŭ povas esti kunhavigataj", diras Escribano. "Kio ŝanĝiĝas, estas la respondo de la aŭtoritatoj".

"La latin-amerika regiono estis pioniro en la disvolvo de politikoj pri migrado, la medio kaj klimata ŝanĝo, eble samtiel kiel la pacifika regiono", li aldonas. "En pluraj landoj de la regiono, kiel Peruo, Gvatemalo, Belizo kaj Ĉilio, klopodoj estas antaŭenigataj por plibonigi la politikan respondon al klimata migrado".

Ĉe se restas iuj leĝaj mankoj, ekde 2000 Peruo establis plurajn referenckadrojn

pri klimatsanĝiĝo, kaj nun havas larĝan gamon de juraj instrumentoj kaj politikoj aplikeblaj al klimata migrado.

Kvankam plej multaj klimataj migradoj plu restas internaj kaj sekve estas respondec de ŝtatoj, disvolviĝas ankaŭ regionaj iniciatoj, kiel rimarkigas Escribano.

“ La lasta marborda fenomeno El Niño, en 2017, delokis preskaŭ 300 000 homojn

"En Sud-Ameriko, la regiona organizo kun la plej progresinta aliro al klimata migrado estas la Sud-Amerika Konferenco pri Migrado (SAKM)", laŭ li. "Ĝi nuntempe laboras pri reliefigado de politikoj pri migrado, medio kaj klimatsanĝiĝo". Tio estas neceso pli kaj pli evidenta, konsidere la estontan efikon de naturaj katastrofoj sur la loĝantaron de la kontinento. ■

-El la hispana kaj la angla esperantigis Toño del Barrio (Hispanio)

En Kanado, centro traktas la vundojn de ekzilo

La psikologia aflikto suferata de migrantoj kaj rifuĝintoj dum longa tempo estis malatentata. Sed tio ŝanĝiĝas per la enkonduko de servoj, kiaj estas la Specialigitaj Psikologiaj Servoj por Enmigrintoj kaj Rifuĝintoj ĉe la Hospitalo Jeffery Hale en Kebekio, kiuj traktas la simptomojn de pacientoj konsiderante ilian originan kulturon.

Guy Sabourin

Sendependa ĵurnalisto en Montrealo.

Assane Traoré*, nun rifuĝinto en Kebekio, antaŭ nelonge foriris de Nord-Afriko, kie li propraokule vidis masakrojn kaj perfortojn krimfaratajn de ĝihadistaj grupoj. Vespere li ŝlosas sin kaj sian familion en la domo, kuntirante kurtenojn por kovri la fenestrojn. Li konstante sentas sin persekutata.

“Li estas tie ĉi, sed ankoraŭ (pensas ke li estas) tie, samkiel multaj aliuloj,” klarigas la psikologo Jean-Bernard Pocreau, emerita dumviva profesoro ĉe la Lernejo de Psikologio de Universitato Laval, Kebekio, kaj kunfondinto de la Specialigitaj Psikologiaj Servoj por Enmigrintoj kaj Rifuĝintoj (*SAPSIR*), kiu kuracis Traoré. “Tio, kio okazis en lia hejmlando, ne plu okazas tie ĉi. Lia anksio influas lian familion.”

Normale, migrantoj ne suferas pli je mensaj sanproblemoj ol la ĝenerala loĝantaro (unu el kvar personoj dum sia vivo, laŭ la Monda Organizaĵo pri Sano), sed iliaj specifaj spertoj antaŭ migrado kaj en la gastiganta lando povas pliigi ilian psikologian aflikton.

Migrantoj, kiuj havas la oportunon reveni al sia hejmlando, eble foje dronas en deprimado, kaj foje idealigas la vivon pasintan. “Tiu tristo povas kaŭzi aŭ

intensigi antaŭajn latentajn patologiojn, se origine troviĝis fragileco aŭ vundebleco,” diris Pocreau.

Malkodigo de suferado

Sed por azilservoj kaj rifuĝintoj, kiuj spertis disiĝon kaj kor-premitecon, la aflikto povas esti severa. Ili estas facile trafablaj de deprimado kaj anksio, familiaj konfliktoj kaj posttraŭmata streĉo pliigita de ekzilo.

El tio ofte rezultas psikaj malsanoj influantaj la kapon, digestan sistemon, aŭ la spinon. “Ilia sufero estas ankoraŭ tre reala, eĉ se ĝi havas psikan bazon neobserveblan,” laŭ Pocreau. “Multaj migrantoj el tradiciaj kulturoj konsideras siajn malfacilojn tre diferencaj de la niaj. Por tio ni devas unue malkodi ilian komprenon de la situacio.” Tiuj diferencaj patologioj ĉefe efikas sur memkonfido, sociaj rilatoj kaj percepto pri la futuro.

Migrantoj kaj rifuĝintoj ankaŭ suferas diversgrade pro la institucia perforto kaj ripetaj atakoj kiuj okazas en ilia gastiganta lando. Ekzemple, postvivantino de la ruanda genocido, kiu perdis sian familion kaj kelkajn el siaj infanoj dum la konflikto, strebis starigi novan vivon en Kebekio. Iuvespere, ŝi estis atakita forlasante la laborejon. “Tiu atako revokis ĉiujn siajn antaŭajn traŭmatojn,” rememoras Pocreau.

“La retrovo de sia vikleco (en ŝia nova lando) kolapsis. Neracieco superis, kaj lasis ŝin senti ke ŝi ĉiam estas en danĝero, kie ajn ŝi estas.”

La kontribuo de etnopsikiatrio

“Ĉe la turniĝo de la jarmilo, migrantoj kaj rifuĝintoj sentis sin miskomprenataj kiam ili proksimiĝis al la sanprotektita sistemo dum periodoj de psikologia aflikto,” klarigas la psikologo Lucienne Martins Borges, profesoro ĉe la Lernejo de Sociala Laboro kaj Krimologio de Universitato Laval, kaj kunfondinto de *SAPSIR*. “Ni konscias tiun problemon, sekve ni kreis servon por ili.”

Bazite en ejo ĉe la Kuraca Servo pri Rifuĝintoj de la Hospitalo *Jeffery Hale* en Kebeko, *SAPSIR* estas parto de la prisana stablo subvenciata per publik-fonduso. “Por kompleksaj situacioj, la larĝ-grupa metodo estas plej bona,” diras Borges. La teamo konsistas el la persono kiu unue kondukas la individuon al la servo, sperta psikologo kaj helpeterapiisto, sociala laboristo, flegistino kaj interpretisto kaj kultura peranto.

“La homoj, kiujn ni vidas, venas ofte el kolektivoj aŭ komunumaj organizoj, sekve ili respondas pli bone al grupa interveno,” ŝi aldonas. Depende de la kazo, troviĝas



ankaŭ et-grupaj sekvantoj. Iuj kazoj estas eble vidataj de eta teamo el du aŭ tri profesiaj, kaj malofte unuopaj sekvantoj.

“Dum tiuj kunvenoj, ni devas bazi nin sur la persona kulturo, la elementoj formantaj lin aŭ ŝin kaj havantaj sencon por li aŭ ŝi,” klarigas Pocreau. “Ni devas iom post iom eniri ilian mondon kaj tiel labori kune por teksti kaj konstrui komprenadon kiu ebligas al ili interligiĝon. Tio estas ŝlosila afero se la persono volas akcepti la kuracadon kaj konsideras tion konvena kaj utila por si mem.”

Tiu metodo devenas de etnopsikiatrio, kiu donas centran lokon al la kultura dimensio en la prezento de psikologiaj simptomoj. La teamo renkontas la personon dekkvin- ĝis deksepofoje, kaj poste superrigardas la intervenanton transprenantan. Jen kiel la SAPSIR-metodo disvastiĝas tra la lando.

“Mi estas en tiu kampo jam de kvaronjarcento kaj mi povas sciigi vin ke ni estas atestantaj evoluon inter la intervenantoj,” insistas Pocreau. Li fidas ke iuj profesiuloj en Kebekio estas nun inspiritaj de etnopsikiatria pensado kaj la interkultura klinika metodo por trakti la psikologian suferon de migrantoj.

Restarigo de fido sur la estonteco

Migrantoj kaj rifuĝintoj bezonas fizikan kaj psikologian sekurecon kaj certigon, ke ili povos fari planojn por la estonteco. Ili

bezonas scii kiel ili povas kontinue esti si mem en nova loko. Ili bezonas tempon, protektan reton kaj homojn ĉirkaŭe por senti sin sekuraj.

Ekzemplo de tio estas la kazo de agrikultura inĝeniero el Sud-Ameriko, kiu estis enprizonigita de milico post aktiva partopreno en kamparaj komunumoj. La kaptantoj ĉirkaŭfermis lin en sako, jetis lin en akvon kaj pafis kontraŭ li. Li mirakle eskapis, sed alveninte en Kebekio en stato de serioza deprimado, li ne povis imagi futuron por si.

“SAPSIR-metodo donas centran lokon al la kultura dimensio en la prezento de psikologiaj simptomoj

Tio ŝanĝiĝis post lia partopreno en loka iniciato por savi riveron en Kebekio. “Li trovis sin en familiara situacio, en mondo kiun li konas kaj komprenas” klarigas Pocreau. “Estas tio, kio ebligas al persono sperti la koherecon kaj kontinuecon de si mem.”

“Tio similas al antaŭ-kaj-posta reklamo por plastia kirurgio,” diras entuziasme Borges. “Vi povas fizike vidi la ŝanĝon. Persono taliklina, malvigla, en aflikto fariĝas aliulo rapide sindonema, ridanta kaj fidanta je la futuro. Se ni ne estus vidintaj tiujn rezultojn en terapio, mi pensas ke ni ne havus la energion por daŭrigi nian laboron.”

“Foje ni perdas kontakton kun homoj, kiuj portas agresemon, kiuj ne estas si mem, sentas sin tristaj kaj depresiaj,” aldonas la terapiisto. “Ili ne plu kredas al aliuloj kaj ne povas teni ligan kun ni.”

“Nia sistemo respondas al bezono kaj la plejparto de la homoj, kiujn ni vidas, retrovas sencon en sia vivo,” diras Borges. Ŝi zorgas pri tio, ke interrompo en la servo por infanoj de SAPSIR afekcias ilin – la programo revenos sur la vojon en aŭtuno 2021.

“Tio, kio zorgigas min, estas tiuj homoj kiuj ne kontaktas nin, speciale infanoj, multaj el ili estas traŭmatizitaj.” ■

-El la angla esperantigis Mao Zifu (Ĉinio)

*Iuj nomoj estas ŝanĝitaj por protekti la identecon de tiuj intervuitoj.

ICCAR: Reto bonveniganta urbojn

Säli, Ali kaj Nariman havis nur du semajnojn por certigi sian agadon. La tri junaj germanoj estis elektitaj kiel reprezentantoj de la kampanjo Solidara Homaro kun la celo batali kontraŭ stereotipoj pri homoj el enmigranta-fono.

Emfazante la integrajn sukcesajn historiojn de Säli, medicina studento, Ali, fajrobrigadisto kaj sportisto, kaj Nariman, mararmea oficiro, la kampanjo iris surloke kaj rete en sociaj retoj de la 26a de novembro ĝis la 7a de decembro 2019.

Kun mesaĝoj por akceli diversecon kaj inkluzivecon, videoj kaj 1000 afiŝoj kun la protagonistoj estis metitaj sur la stratoj de tri germanaj urboj: Berlin,

Stuttgart kaj Leipzig.

Tiu kampanjo estas ĝuste unu ekzemplo de agadoj funkciigitaj de la Internacia Koalicio de Urboj kontraŭ Rasismo (angle ICCAR).

Lanĉita de UNESKO en 2004, tiu iniciato celas emfazi la kontribuon de migrantoj kaj rifuĝintoj al la evoluo de gastigantaj socioj.

Kun reto el pli ol 500 urboj tra la mondo, ICCAR partoprenas en politika evoluo, aktivaĵoj de kapablokonstruo kaj sciigo - por promocii inkluzivan urban evoluon kiu estas libera de ĉiaj formoj de diskriminacio.

-El la angla esperantigis Mao Zifu (Ĉinio)

▼ Memento kiel pafmortigita,
Placo San Felipe Neri, Barcelono, 1979,
el Nexus, fare de Marcelo Brodsky.
Naskita en 1954 en Bonaero, li estis
devigita ekziliĝi en Barcelono, post la
militista puĉo en Argentino en 1976.



Poŝtelefonoj fariĝis nemalhaveblaj por la vivo de migrantoj kaj rifuĝintoj - tio ebligas al ili resti en kontakto kun la familioj, serĉi financon subtenon en okazoj de bezono kaj trovi informojn necesajn al la daŭrigo de siaj ofte danĝeraj vojaĝoj. Esploro en Fez, Maroko, gvidita de la aŭtoro, substrekas la grandan gravecon de porteblaj teknikoj en ĉiu fazo de la itinero.

Poŝtelefono:

Nemalhavebla ilo por migrantoj

Moha Ennaji

Lingvisto, verkisto kaj aktivulo, li estas prezidanto kaj kunfondinto de la Internacia Instituto por Lingvoj kaj Kulturoj (angle *INLAC*) kaj profesoro pri Lingvistikaj kaj Kulturaj Studoj ĉe la Universitato "Sidi Mohamed Ben Abdellah" en Fez.

“Foje mi devas elekti inter manĝaĵo kaj retaliro, por resti en kontakto kun mia familio hejme. Kiam mi bezonas monon, mi vokas ilin per *WhatsApp* kaj ili tre rapide sendas tion.” Tiel Mamadou, 22-jara junulo el Niĝero, resumas la ŝlosilan rolon, kiun poŝtelefonoj nun ludas en la vivo de migrantoj. La fakto, ke rifuĝintoj povas elspezi ĝis unu trionon de sia mono en retaliro – laŭ la oficejo en Rabat de *UNCHR*, la Agentejo por Rifuĝintoj de Unuiĝintaj Nacioj – estas pruvo kiel gravaj tiuj porteblaj iloj estas.

Kiam migrantoj lasas sian hejmlandon, ili tute dependas de siaj poŝtelefonoj. Poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj havas signifan efikon en iliaj travivaĵoj en ĉiu fazo de ilia itinero. Tiu konkludo venis el la surloka esploro, kiun mi gvidis – kun Filippo Bignami, sperta esploristo kaj lekciisto ĉe la Universitato pri Aplikaj Sciencoj kaj Artoj de Suda Svislando (*SUPSI*) – inter 2017 kaj 2019 en Fez, kun rifuĝintoj kaj kontraŭleĝaj migrantoj el Sirio, Libio kaj subsahara Afriko.

Ekde 2005, Maroko, kiu delonge estas lando de elmigrado, fariĝis trairejo kaj akceptejo por granda nombro da migrantoj el subsahara Afriko – aparte el Kongolando, Ebur-Bordo, Malio, Niĝerio kaj Senegalo. Ili esperas atingi Eŭropon, ĉu tra la hispanaj enklavoj Ceŭto kaj Melilo, ĉu tra la Kanariaj Insuloj, antaŭ ol transiri Mediteraneon aŭ la Atlantikan Oceanon. Kvankam ili kutime konsideras sian restadon en Maroko simpla halto, multaj migrantoj fine restas dum monatoj, aŭ eĉ jaroj, en malfacilaj kondiĉoj.

Kunlaborado kaj reciproka subteno

La homoj, kiujn ni intervjuis, havis variajn eduknivelojn, kiuj influis ilian “ciferecan alfabetecon” aŭ ilian kapablon havi avantaĝon de la disponeblaj oportunoj per Interreto kaj la retoj de poŝtelefona tekniko.

Nesurprize, ni malkovris, ke poŝtelefonoj subtenas migrantajn fluojn per disponigo de retaj informoj gvidantaj la vojaĝon




Rifuĝinto povas elspezi ĝis unu trionon de sia buĝeto por havi retaliron

– ofte per influo en ilia decido foriri, la elekto de vojoj kaj finaj celoj kaj sekve tra la itinero.

Ili ankaŭ faciligas kunlaboradon kaj reciprokan subtenon inter migrantoj. Kontraŭleĝaj migrantoj kutime dependas pli de neoficialaj inform-fontoj – speciale informoj liveritaj de kontrabandistoj.

Kontrabandistoj havas la avantaĝon esti pli spertaj pri la vojoj, transiro de landlimoj kaj vizaj proceduroj. La migrantoj kun kiuj ni parolis diris, ke ili ricevis precizan informon el la kontrabandistoj, kiuj ofte uzis sociajn retejojn por helpi dum la itinero.

Regis, 23-jarulo el Kameruno, sekvis instrukciojn de sia kontrabandisto tra tekstomesaĝoj, de sia hejmlando ĝis Fez. Tamen iuj migrantoj rifuzas fidi la servon de kontrabandistoj kaj preferas daŭrigi la vojaĝojn uzante navigilojn kiel *GPS* kaj *GoogleMaps*.



▼ Notkajereto, sako kaj poŝtelefono estas ĉio, kion la 25-jara Saeed kunportis kiam li forlasis Sudanon por iri al Francio. El la serio “En la sako de rifuĝintoj”, de la franca fotojurnalisto Maxime Reynié.

Komforta ligo al la geamatoj

Por tiuj, kiuj estas pelataj preni la necertajn kaj ofte danĝerajn vojojn de migrado, poŝtelefonoj estas ankaŭ – eble ĉefe – komforta ligo al la geamatoj, kiuj postrestis. Tiuj restas informataj pri la vojaĝkondiĉoj tra mesaĝoj kaj fotoj interŝanĝitaj per *WhatsApp*, *Messenger*, *Telegram* aŭ *Facebook*.

La morala subteno oferata de la familioj estas en multaj okazoj akompanata de financa subteno – kiu ofte determinas ĉu la vojaĝo plu okazas aŭ ne. La rimedoj liveritaj de la familio estas ofte rekte transsenditaj per poŝtelefonaj teknikoj. “Sen mia poŝtelefono kaj sociaj retejoj, mi sentus min tre flankelasita kaj izolita,” diras Yaya, 22-jarulino el Gvineo. “Mi uzas ĝin por peti helpon de amikoj kaj por resti en kontakto kun mia familio.”

Sed novaj teknikoj ne liveras protekton kontraŭ ĉiuj riskoj ligitaj al la kontraŭleĝa migrado. Nia esploro rivelis, ke la plej bone informitaj migrantoj ne nepre

“

plej bone informitaj migrantoj ne nepre estas pli sukcesaj atingi siajn deziratajn cellandojn.

estas pli sukcesaj atingi siajn deziratajn cellandojn. Malgraŭ siaj klopodoj, ili estas same probable viktimoj de ŝteloj kaj raboj aŭ submetitaj al sekurecaj rimedoj, kiuj haltigas ilin en la landlimoj – devigante ilin resti en la trairata lando en multaj okazoj.

Novaj teknikoj povas ankaŭ esti fontoj de falsaj informoj kaj onidiroj, kiuj povas influi la elektojn de potencialaj migrantoj. Ibrahima, 23-jarulo el Ebur-Bordo, decidis forlasi sian landon post la legado en Interreto, ke se li estos en Maroko li estos

sendita al eŭropa lando kiel azilpetanto, kiu vizitadis lernejon. Post kiam li rimarkis, ke tio ne estas vera, li ĉiunokte riskis sian vivon klopodante por eniri kamionon, kiu celas Hispanion. Tiaj historioj estas tre ordinaraĵoj inter kontraŭleĝaj migrantoj.

Tiuj, kiuj sukcesas atingi sian celon povas ankaŭ kontribui al la influado de estontaj migrantoj per kundivido de informoj kaj bildoj pri la nova vivo, tra mesaĝ-aplikaĵoj kaj sociaj retejoj. ■

-El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)

Venera Toktorova:

Kirgiza migrantino kiu faras sian vojon

Atinginte Moskvon antaŭ 13 jaroj, Venera Toktorova sin vivtenis, samkiel multaj aliaj migrantoj el Kirgizio, per pezaj kaj malaltenspezaj laboroj. Sed hodiaŭ ŝi estas kunposedanto de du restoracioj kaj la sola kirgiza kinejo Manas en la ĉefurbo.

Nazigul Jusupova

Kirgiza ĵurnalisto en Moskvo, Rusa Federacio

En la moskva kafejo *Sulaiman-Too* oni ĝuas belan muzikon orientan en vasta kaj hela salono plenplena de klientoj, dum kelneroj rapidas kun pletoj. Delikata virino en bela robo kun ŝia mallonga hararo kombita malantaŭen observas ĉion serioze kaj foje rigardas sian poŝtelefonon. Ŝi estas Venera Toktorova, 40-jara kunposedanto de la kafejo.

Ŝi translokiĝis al Moskvo antaŭ 13 jaroj el la kirgiza urbeto Osh. Nun ŝi estas sukcesa entreprenisto kiu kunposedas du restoraciojn kaj ankaŭ la unuan kaj solan kinejon pri kirgizaj filmoj en la urbo. Venera revis pri tiu vivo kaj trapasis malfacilan vojon por realigi sian revon. Venera eksdziniĝis kiam ŝi estis 27-jara, kaj iris al Moskvo kun sia 3-jara filino por komenci novan vivon.

En Kirgizio oni proponis al ŝi laboron kiel instruisto – ŝi estas fakulo pri ekonomiko. “Mi volis kolekti monon por mia domo, sed tio ne eblus, ĉar la salajro ŝajne kovrus nur nutradon”, diras ŝi. Averaĝa salajro en Kirgizio estas \$200 monate, la plej malalta inter la landoj de la regiono. En 2019 estis pli ol unu miliono da enmigrintoj el Kirgizio en Rusio.

La ebloj alportitaj de novaj lando kaj urbo estis kvazaŭ blanka papero, sur

kiu ŝi povus verki novan ĉapitron de sia vivhistorio. Malgraŭ la monmanko, daŭris ŝiaj revo kaj persistemo. De infaneco ŝi havas tian karakteron kiu multe helpis ŝin trapasi malfacilaĵojn. Por helpi sian familion, post la lernejo ŝi kutimis vendi bagatelaĵojn: maĉgumojn, cigaredojn ktp. Pro tiu firmeco ŝi ne timis la situacion kiu atendis ŝin en Moskvo.

Venera rememoras: “Tiam la kirgizaj enmigrintoj okupiĝis ĉefe pri purigado kaj loĝis en keloj”, kaj tiam ankaŭ ŝi loĝis tie kun sia filino. Komence ŝi laboris en elita domo kiel domzorgisto. Poste ŝi laboris kiel purigisto kaj plue kiel vartistino en la sama infanĝardeno kie estis edukata ŝia filino. Ĉar akompani la kreskon de sia filino estis ŝia prioritato, ŝi tiam rifuzis pli bonpagajn postenojn kiuj devigus ŝin lasi la infanon ĉe vartisto.

La forto de revo

Post unujara laborado, Venera kolektis monon sufiĉan por aĉeti domon en Osh. Ŝia tiama rutino estis matene purigi la plankon ĉe unu dunganto, konduki sian filinon al la infanĝardeno kaj iri al aliaj laborejoj, vespere preni la filinon, nutri kaj enlitigi ŝin kaj iri al alia laborejo. Ŝi laboris kiel “hamstro en rado”, sed neniam perdis sian kuraĝon.

Iufoje, sidante surstrate kaj rigardante lumigitajn fenestrojn ŝi imagis, ke iam ŝi

havas siajn domon kaj televidilon, kiun ŝi spektus post la laboro. “Nun mi havas grandan televidilon en mia propra domo en Moskvo. Revoj realiĝas”, ŝi diras. Ŝi ne plu edziniĝis kaj ŝia filino nun estas 16-jara.

La deziro certigi al sia filino altkvalitan edukadon, kaj ŝia propra sukceso, igis Toktorova prokrasti sian revenon al sia hejmlando. Ŝi sentis, ke daŭre estas revoj realigitaj en Moskvo, kaj prokrastis sian revenon. “Multfoje mi forlasis Moskvon dirante al mi mem, ke mi ne revenos, sed ĉiufoje mi revenis”.

Antaŭ tri jaroj Venera malfermis kun siaj partneroj en Moskvo la kinejon Manas, omaĝe al la kirgiza eposo. Pro eraroj kaj manko de sperto ili fermis la kinejon, sed samlandanoj tiom ŝatis ĝin, ke post nelonge ili petis ĝian refunkciigon.

“

Manas jam fariĝis unu el la ĉefaj lokoj en Moskvo, kie kirgizoj kunvenas por ĝui sian kulturon

Renaskiĝo de la kirgiza kinarto

Kirgiza kinarto havis sian oran tempon en la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento. Tiu periodo estas konata kiel "Kirgiza miraklo", tiam junaj reĝisoroj faris filmojn laŭ verkoj de Ĉingiz Ajtmatov. Post la falo de *USSR* kaj sendependiĝo de Kirgizio, la filmindustrio restis sen subvencio kaj tio malbone influis al la kvalito kaj periodeco de filmoj. Nur en la lastaj jaroj filmistoj komencis krei vere popularajn kaj monprofitajn projektojn. Nun en Kirgizio oni spektas kaj lokajn kaj eksterlandajn filmojn.

Spekti kirgizajn filmojn fariĝis kutimo de kirgizoj en Moskvo dank' al la kinejo de Venera. En tri jaroj ĝi fariĝis unu el la gravaj lokoj de la urbo kie kolektiĝas kirgizoj por ĝui sian kulturon kaj kontentigi sian sopiron al sia hejmlando. Spektantoj sentas sin kvazaŭ en Kirgizio dum spektado de tiuj filmoj, kaj antaŭ la

foriro ofte esprimas dankon al Venera pro la ŝanco spekti filmojn en la gepatra lingvo kaj ĝui la belan naturon de Kirgizio, kiu multe allogas kin-reĝisorojn kaj artistojn.

En 2018, okaze de la 90-jariĝo de Ĉingiz Ajtmatov, la kirgiza ambasadejo en Rusio donacis al la kinejo kolekton da filmoj adaptitaj el lia verkaro. Dank' al la donaco dum unu jaro en Manas oni spektis senpage la kirgizajn filmojn de la "ora epoko". "Tio estis ŝika donaco", – diras Venera antaŭ ol konfesi, ke antaŭe ŝi ne tiel interesiĝis pri la evoluo de la kirgiza kinarto.

“

Malgraŭ la malfacilaĵoj, mi ĝojas, ke mi havis tian sperton

Post 13 jaroj en Moskvo, la sukcesa entreprenanto dankas la urbon pro sia sperto: "Dank' al Moskvo mi progresis, ŝanĝis mian pensmanieron kaj fariĝis pli forta. Malgraŭ tio, ke mi multe ploris kaj trapasis multe da malfacilaĵoj, finfine mi estas ĝoja pro tio ke mi nun havas tiom da spertoj".

Tamen, Venera esperas iam reveni al Kirgizio: "Mi amas Moskvon, sed mi volas vivi en mia patrolando. Kvankam ni bone lernis kaj atingis sukceson kiel migranto, mi daŭre sentas min fremdulo." ■

-El la rusa esperantigis Chimedtseren Enkhee (Mongolio)



Ĉinio, post Barato kaj Meksiko, havas la plej grandan nombron da homoj, kiuj forlasis sian hejmlandon por elmigri aliloken. La historio de la ĉina elmigrado, markita de sinsekvaj ondoj, reiras al la malfermo de la antikva mara silka vojo.

La eksterlandaj ĉinoj: Longa rakonto

Zhuang Guotu

Speciala profesoro de la universitato Huaqiao kaj profesoro ĉe la universitato Xiamen, en la ĉina provinco Fujian. Lia esplorado rilatas al la historio de etna Ĉinio kaj al la historio de ĉinaj internaciaj rilatoj. Li ankaŭ estas membro de la konsila komitato de la Ŝtata Konsilantaro por Aferoj de Transmaraj Ĉinoj.

Nuntempe estas pli ol 10,7 milionoj da eksterlandaj ĉinoj – proksimume 60 milionoj, se oni kalkulas ankaŭ iliajn idojn – laŭ Internacia Organizaĵo pri Migrado (angle *IOM*).

Ĉi tio estas unu el la plej altaj ciferoj de migrado en la mondo. Sed la historio de la ĉina migrado estas antikva. Ĝi komenciĝis per la malfermo de la mara silka vojo antaŭ pli ol 2 000 jaroj, kun migrantoj, kiuj moviĝis ĉefe al sudorienta Azio.

Komence de la dekkvina jarcento pluraj ĉinaj kvartaloj – ĉiu el ili gastigis milojn da eksterlandaj ĉinoj – estis starigitaj en Sumatro kaj Ĝavo (nuntempa Indonezio).

Sed fine de la deksesia jarcento komenciĝis larĝ-skala migrado. Intertempe eŭropanoj ekloĝis en la fora oriento kun la intenco enmeti ĝin en la reton de la monda komerco. Ili konkurencis inter si por grandigi kaj evoluigi siajn koloniojn en sudorienta Azio, kreante bezonon pri ĉinaj komercistoj kaj laboristoj.

Komence de la deksepa jarcento estis proksimume 100 000 eksterlandaj ĉinoj en sudorienta Azio, kaj proksimume 20 000 ĝis

30 000 en Japanio. Ili okupiĝis pri komerco kaj metioj. En la mezo de la deknaŭa jarcento ilia nombro estis suprenirinta al 1,5 milionoj kaj la plejparto el ili estis en sudorienta Azio. En Japanio ili integriĝis en la japanan socion.

La efiko de la opiaj militoj

De la mezo de la deknaŭa jarcento ĝis la unuaj 1940-aj jaroj, dua ondo de migrado okazis en Ĉinio.

Ĝeneralaj simplaj laboristoj, aŭ tiel nomataj “ĉinaj kontraktitaj sklav-laboristoj/kulioj”, konsistigis la plej grandan parton de ĉi tiu ondo. Dum la du opiaj militoj, en la meza deknaŭa jarcento, Britio kaj Francio perfortis la registaron Qing rajtigi amasan eliron de ĉinaj laboristoj al okcidentaj landoj kaj al iliaj kolonioj por anstataŭi nigrajn sklavojn.

Ĉi tio estis la komenco de la disvastiĝo de ĉinoj tra la mondo – de sudorienta Azio al Ameriko, Afriko, Eŭropo kaj Aŭstralio.

Post la unua mondmilito kaj antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito en Pacifiko, la ekonomia prospero de sudorienta Azio plue instigis la bezonon

“

Aparta trajto de la ĉina disa komunumo aŭ diasporo en la mondo estas la graveco, kiun ili donas al edukado de la posta generacio

pri laboristoj, kiu estis plenumita de ĉinaj migrantoj. Komence de la 1940-aj jaroj estis proksimume 8,5 milionoj da ĉinaj elmigrantoj en la mondo – pli ol 90 elcentoj el ili en sudorienta Azio.

Ekde 1949, kiam la Ĉina Popola Respubliko estis fondita, ĝis la lastaj 1970-aj jaroj larĝ-skala elmigrado estis ne plu permesata. La tajdo de transmara ĉina almigrado, kiu daŭradis dum pli ol 300 jaroj, estis interrompita.

Tria ondo de novaj ĉinaj migrantoj komenciĝis en la jaroj 1980-aj kaj ĝi estis integra parto de la kresko de tutmonda migrado. La plejmulto de la migrantoj venis el la ĉeftero, sed ankaŭ el Tajvano kaj Honkongo de Ĉinio.





▼ Infanoj lernantaj en lavejo en Novjorko, fare de la dokumenta fotisto Bud Glick. De 1981 ĝis 1984 li havis la taskon por la Muzeo de Ĉinoj en Usono (angle MOCA) foti la vivon surstrate, la homojn kaj hejmajn vivojn de la ĉina kvartalo en Manhattan.

Ili iris ĉefe al industriaj landoj – la unua celo por eksterlandaj ĉinoj en tiu tempo estis Usono.

La ĉina rapida ekonomia kresko kaj la evoluo de eksterlandaj komercaj rilatoj en la lastaj jaroj kuniris kun granda nombro da ĉinoj, kiuj moviĝis al evolu-landoj. La nombro de ĉinaj migrantoj leviĝis en centra kaj okcidenta Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko.

Konstruado de fervojoj kaj minado de oro

La eksterlandaj ĉinoj faris signifajn kontribuojn al siaj novaj socioj. Kaj en la tropikaj landoj de sudorienta Azio, kaj en la mildklimataj landoj de Eŭropo kaj Ameriko ili estis pioniroj en la konstruado de vojoj kaj rekuperis sovaĝejojn en sudorienta Azio en la dekoka jarcento. Ili konstruis havenojn kaj urbojn, minis oron en Usono en la deknaŭa jarcento; konstruis fervojojn kaj malfermis restoraciojn kaj vendejojn de manĝaĵoj en Eŭropo en la dudeka jarcento.



Ekde la 1980-aj jaroj ĉinaj migrantoj moviĝis ĉefe al industriaj landoj

Kun tradicio de forta laborado kaj sobereco ĉinaj migrantoj emas akiri sian lokon en la socio, ĉar ili ŝparas siajn enspezojn kaj investas en nmoveblaĵojn por protekti sin tra ekonomiaj malfacilaĵoj. Tiel, kiam krizo alvenas, ili povas ĉiam prizorgi sin mem antaŭ ol serĉi helpon ĉe la familio aŭ geamikoj – por ne paroli pri la nova socio, en kiu ili vivas.

Eksterlandaj ĉinoj plu havadas fortajn ligojn al sia patrujo. Ili kredas, ke Ĉinio estas ilia patrujo – ligo kiu ofte daŭras dum generacioj.

Unu el la ĉefaj kialoj, pro kiuj ili elmigras, estas por esti kapabla subteni siajn familion kaj geamikojn – ili havas kulturon sendi monon por finance helpi tiujn, kiuj restis hejme.

Edukado de rifuĝintoj: Grava manko de mono

Preskaŭ duono de la homoj dislokitaj en la mondo estas infanoj. Ilia nombro daŭre altiĝis dum la lastaj jaroj – la nombro de rifuĝintaj infanoj en lerneja aĝo pliiĝis je 26 elcentoj de la jaro 2000. Ĉi tio estas la eltrovo el raporto de 2019 de la Monda Eduka Kontrolado (angle *GEM*) de UNESKO: *Migrado, dislokiĝo kaj edukado: Konstrui pontojn sen muroj*. Ĝi substrekas, ke dum la rajto je bonkvalita edukado de ĉi tiuj infanoj estas agnoskata teorie, ĝi ne ĉiam konkretiĝas en lerno-ĉambroj.

Malgraŭ ĉio progresoj estis faritaj por integri ĉi tiujn infanojn, aparte fare de kelkaj el la plej rifuĝint-havaj landoj kiel Ĉado, Etiopio kaj Ugando. Kanado kaj Irlando elstaras pro tio, ke ili plenumis politikojn de inkluziviga edukado por enmigrintoj.

Ĉiuokaze la klopodoj por atingi inkluzivecon riskas malsukcesi pro manko de kvalifikitaj instruistoj. Por liveri bonkvalitan edukadon al ĉiuj rifuĝintoj, Germanio bezonus 42 000 novajn instruistojn, Turkio 80 000 kaj Ugando 7 000. Por subteni infanojn, kiuj povas esti spertintaj traŭmatojn, ĉi tiuj instruistoj bezonas fakan trejniĝon, kiu estas ofte nesufiĉa aŭ neekzistanta. En Libano, ekzemple, nur 55% de instruistoj estis trejnitaj por alfronti la bezonojn de dislokitaj lernantoj.

Financaj rimedoj ankaŭ estas dolore nesufiĉaj. En 2016 nur 800 milionoj da dolaroj estis elspezitaj por edukado de rifuĝintoj en la mondo – triono de la bezonata sumo laŭ la raporto.

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)

Dum proksimume unu jarcento la ĉina disa komunumo partoprenis ankaŭ en la ĉina modernigo. De la 1980-aj jaroj pli ol du trionoj de la eksterlanda investado, akceptita de la ĉina registaro, venis de ĉinoj eksterlande.

Trajtoj kaj stereotipoj

La eksterlandaj ĉinoj havas reputacion esti laboremaj kaj ŝparemaj. Alia distinga trajto de la disa komunumo tra la mondo estas la graveco, kiun ĝi donas al eduko de la posta generacio.

“Ĉia laboro estas malsupera, nur legado estas supera” estas malnova ĉina kredo. Ĉu riĉaj, ĉu malriĉaj, ĉinaj familioj eksterlande estas pretaj fari sinoferojn por certigi, ke iliaj infanoj ricevas la plej bonan edukadon eblan.

Ĉi tiuj trajtoj foje pliiĝis kliŝajn perceptojn pri ĉinaj migrintaj komunumoj, kiuj plue larĝigis la fendon inter ili kaj la aliaj sociaj grupoj en iliaj cel-landoj.

Ĉiuokaze estas malfacile fari ĝeneraligojn pri tia granda grupo de migrintoj. En tutmondiĝinta mondo, kie kulturoj estas daŭre komunikantaj, ĉia provo doni etiketon al difinitaj grupoj de homoj estas mallong-vida kaj malracia. Eksterlandaj ĉinoj plu esploras kaj konstruas siajn identecojn en ĉi tiu ĉiam pli integriĝanta mondo.

En la kunteksto de la pandemio de KOVIM-19, kiam diskriminacioj kontraŭ homoj el orientazia deveno eksplodis, la defioj ne povas esti solvataj en unu tago. Sed la ĉinoj eksterlande dum jarcentoj evoluigis reziston kaj readaptiĝon al tiaj kliŝoj, kiuj povas esti utilaj, kiam oni devas kontraŭstari ĉi tiujn malfacilaĵojn. ■

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)

Dentoj: Arkivoj pri homaj translokiĝoj

Valoraj informfontoj por arkeologoj, niaj dentoj povas malkaŝi niajn pasintajn vojaĝojn, eĉ post jarcentoj.

Jenny Dare

UNESKO

Per analizo de praaj dentoj, arkeologoj trovas spurojn de migrado. “Per zorga esplorado, la kemia konsisto de homa dento rivelas etan vivrakonton,” diras Carolyn Freiwald, arkeologo kaj asociita profesoro pri Antropologio ĉe la Universitato de Misisipo, Usono, kiu studas pridentan biologion kaj kemion.

Kiam dentoj formiĝas, elementoj el manĝaĵo kaj akvo, kiel oksigeno, nitrogeno kaj karbono, estas enmetataj en ilin. Ĉi tiuj kemiaj spuroj malkaŝas kie la manĝaĵoj kreskis kaj estis konsumitaj. “En kulturoj tra la mondo, ni trovis homojn, kies dentoj rakontas al ni, ke ili migris. Ni ofte imagas, ke antikvuloj estis nemoviĝemaj, sed fakte homoj ĉiam translokiĝis”, klarigas Freiwald.


Male al ostoj, kiuj regeneriĝas tra nia vivo, dentoj ne produktas novajn ĉelojn post kiam ili formiĝas. La unua molaro, ekzemple, formiĝas kaj stabiliĝas dum infanaĝo, kiam “registrante” la dieton de la bebo. La saĝodento estas taglibro pri manĝkutimoj de plenkreskuloj kaj de kie devenas ilia manĝaĵo. Plenbuŝo da dentoj povas provizi nin per mapo de la loko kie iu vivis de naskiĝo ĝis entombiĝo.

La dentoj ne estas la nura informfonto. La tartro – etaj tavoloj de manĝaĵoj kaj bakterioj, kiuj kreskas tie, kie la dentoj renkontas gingivojn – enhavas 25-oble pli da DNA ol ostoj. En 2019, esploristoj de la Universitato de Adelajdo, Aŭstralio, uzis tartron el la dentoj de antikvaj polinezianoj por spuri la tempojn kaj ĝustajn migradajn itinerojn de prahomoj en Pacifiko. Laŭ antropologoj, per esplorado pri tartro oni

povas trovi respondojn al la enigmoj pri homa migrado en antikveco.

Nuntempe krimmedicinistoj aplikas ĉi tiujn teknikojn por identigi migrantojn, kiuj mortis dum danĝeraj vojaĝoj. “Tio estas iom pli malfacila, ĉar modernaj homoj manĝas manĝaĵojn el tre diversaj lokoj, sed se nia laboro en ĉi tiu kampo povas alporti homon hejmen al sia familio, ĝi ja valoras la penon”, klarigis Freiwald.

-El la angla esperantigis Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)



© Gail Euston-Brown/Shutterstock

Eva-Maria Geigl: “La historio de la homaro konsistas el sinsekvo de migradoj”

Ĉu pro kialoj instigitaj de klimatsanĝiĝo, konfliktoj aŭ serĉo de pretervivado, homoj ĉiam moviĝis kaj intermiksiĝis, kiel rezultis el analizo de la genomo de ostoj en arkeologiaj lokoj.

Eva-Maria Geigl, laboras kiel kungvidanto de paleogenomika teamo en la Instituto Jacques Monod de la Franca Nacia Centro por Scienca Esplorado (angle *CNRS*) / Universitato de Parizo.

Intervjuo de Agnès Bardon

UNESKO

● *Kio estas la rolo de paleogenomiko?*

Paleogenomiko estas fako kiu kompletigas arkeologion kaj antropologion. Arkeologoj realigas elfosadojn kaj trovas ostajn fragmentojn, kiujn ili provas loki en difinitajn periodon kaj kulturon. Analizo de homaj restaĵoj de elfosadoj povas identigi la sekson de la individuo, eble ilian aŭ ŝian socian statuson, la malsanojn, kiuj influis lin aŭ ŝin – kaj ofte eĉ donas indikojn pri la funkciado de la koncerna socio.

La laboro de paleogenetikistoj konsistas en la eliro de *DNA* el ostoj por analizi ilian genomon. Tiu genomo tiam estos komparata kun tiu de individuoj, kiuj vivis en aliaj tempoj, en aliaj lokoj, aŭ kun nuntempaj populacioj. Tiamaniere,

ni povas rekonstrui ligitecojn – ligojn de parenceco, genetikan proksimecon – sed ankaŭ la migradojn kaj intermiksiĝojn kiuj okazis en la daŭro de la tempo.

● *Kiel oni povas uzi genomajn informojn por dedukti la biologian historion de iu populacio?*

Genetika analizo ebligas la difinon de la historio de ia setlejo de difinita regiono, kaj tial ankaŭ la movadojn de popolgrupoj kaj ilian seksan intermiksiĝon kun indiĝenaj komunumoj. Paleogenomiko montris ke tion antaŭ 8 500 jaroj, kiam farmistoj de Anatolio aŭ Egea origino moviĝis al nordokcidenta Eŭropo. Agrikulturo kaj besta malsovaĝigo evoluis antaŭ ĉirkaŭ 12 000 jaroj en la fekunda regiono de la proksima Oriento, en Irano kaj en Anatolio. Antaŭ ĉirkaŭ 8 500 jaroj, tiuj kamparanoj komencis migri al Eŭropo

per la kontinenta itinero, kiu komenciĝis en Grekio kaj trapasis la Balkanon, tiam Hungarion, Aŭstrion kaj Germanion por alveni en nordan Francion (en la Parizan Basenon).

Alia vojo sekvis laŭ la Mediteranea marbordo tra regionoj kie hodiaŭ estas Kroatio, Italio, Sicilio, Sardinio kaj Korsiko, kaj plue al la sudo de Francio kaj al la nordoriento de la ibera duoninsulo. Ĉi tiuj fenomenoj estis konataj danke al la analizo de restaĵoj trovitaj dum elfosadoj – inkluzive de fragmentoj de ceramiko, silikaj instrumentoj aŭ ostoj de dombestoj kiel ekzemple ŝafoj, kiujn enkondukis tiuj populacioj de kamparanoj.

Sed de la disponeblaj materialoj arkeologoj ne povis determini ĉu nur la kapabloj kaj teknikoj de la farmistoj estis transdonitaj, aŭ ĉu la inventintoj de ĉi tiuj teknikoj fizike moviĝis. Per genomika analizo eblis konstati, ke la kamparanoj

intermiksiĝis kun la indiĝenaj ĉasistoj-kolektistoj kiuj loĝis en Eŭropo de ĉirkaŭ 14 500 jaroj, kaj parte intermiksiĝis kun tiuj populacioj.

● **Ĉu genombazita analizo foje jetas novan lumon al historiaj faktoj?**

Tio okazis en 2012, kiam la restaĵoj de juna knabino, kiu vivis pli malpli antaŭ 50 000 jaroj, estis malkovritaj en la Denisova Kaverno en la Altaj Montoj de Rusio. La genomika analizo de ŝia falango pruvis la ekziston de loĝantaro samtempa al la Neandertaloj. Tiu populacio, kiu loĝis en Azio, disvastiĝis kaj intergeedziĝis kun la unuaj *Homoj sapiens* el Afriko. Ĝis tiam paleoantropologoj ne suspektis la ekziston de tiu loĝantaro.

La migrado al Eŭropo de la nomadoj *Yamnaya*, de la Ponta Stepo norde de la Nigra Maro, estas alia ekzemplo. Tiuj

populacioj, kiuj havis ekonomion bazitan sur brutbredado, kreskis en centra kaj norda Eŭropo antaŭ ĉirkaŭ 5 000 jaroj. Tiuj stepaj nomadoj, kiuj plejparte estis viroj, tiam intermiksiĝis kun la indiĝenaj kamparanoj de la malfrua Neolitika Periodo. Sed ĉar ilia reprodukta sukceso estis pli alta, okazis signifa genomika anstataŭado – kion oni nomas introgresio.

Eĉ hodiaŭ, en Bretonio, okcidente en Francio, en Irlando kaj en Britio okdek procentoj ĝis naŭdek procentoj de la viroj portas la Y-kromosomon de la *Yamnaya*. Tiu fenomeno estis nekonata de

“
Ne ekzistas genetike ‘pura’ populacio

arkeologoj ĉar neniam materiaj spuroj de preterpasado de la *Yamnaya* estis trovitaj.

● **Ĉu ni konas la kaŭzojn de tiuj malsamaj migradoj?**

Pluraj kaŭzoj povas esti imageblaj, sed ĉiuj estas nur hipotezoj. Ni ne povas liveri sciencan pruvon. La kialoj de tiuj movadoj povus esti klimataj, sed ili povus ankaŭ esti demografiaj. Migradoj povus esti motivitaj de la necesoj rilataj al grupa vivtenado, kiel ĉasistoj-kolektistoj, kiuj sekvis la migradojn de grandaj bestoj. Kiam la klimato ŝanĝiĝis, homoj devis serĉi aliajn regionojn, kie ili povus pretervivi. Ankaŭ bataloj inter homgrupoj povus esti la kaŭzo. Tiel same kiel ni hodiaŭ, homoj antaŭ miloj da jaroj probable moviĝis pro la klimato, pro transvivado aŭ rezulte de konfliktoj.


● **Surbaze de la genom-analizo de niaj prapatroj, ĉu ni povas diri, ke ni ĉiuj estas migrantoj?**

Absolute jes. Unue ni ĉiuj estas afrikanoj, ĉar ĉiuj niaj prapatroj venis el Afriko. *Homoj sapiens* evoluis en Afriko kaj forlasis la kontinenton en ondoj. La lasta ondo estas tiu de niaj rektaj prapatroj. Kaj tiel, ni ĉiuj estas migrantoj ĉar la historio de la homaro konsistas el sinsekvo de migradoj. Ekde la praa tempo, populacioj moviĝis kaj intermiksiĝis. Kaj el tio iafoje rezultas anstataŭado de indiĝenaj populacioj, sed ne ĉiam.

Ni ĉiam ne estas restemaj. Ni ĉiam devis moviĝi kaj adaptiĝi ĉar nia medio ŝanĝiĝas. Ne ekzistas genetike “puraj” populacioj. Tio estas bona afero, ĉar biologie ni bezonas la mikسادon de genomoj. ■

-El la angla esperantigis Ursula Grattapaglia (Brazilo)

▼ Ni ĉiuj estas migrantoj, de serba desegnisto Goran Bajić.




Dominique Roger:

“UNESKO proponis al mi la mondon”

Fotoj: UNESKO / Dominique Roger

Teksto: Katerina Markelova, UNESKO



© All rights reserved

Dominique Roger laboranta en la 1970-aj jaroj

En la 4-a de novembro 1966, *acqua-alta*, altega tajdo, kiu periode inundas Venecion, krevigis la marbordajn digojn, dronigante la urbon sub pli ol unumetra akvosurfaco. Sekve al alvoko pri internacia solidareco lanĉita de UNESKO, venis landoj tra la mondo al la savo de tiu ĉi arkitektura mirindaĵo.

Sendite de la organizo al la loko, Dominique Roger raportis pri la klopodoj farataj por savi la monumentojn kaj freskojn de Venecio, kiuj, tiutempe, ankoraŭ ne estis metitaj en la Mondan Heredaĵo-Liston.

Dum sia tridek-jara kariero, la fotistino – kiu iĝis estro de la fotoservo de UNESKO de 1976 ĝis 1992 – kronikis la agojn de la organizo sur bildoj, kaj ĉe ties ĉefsidejo kaj dum siaj multaj taskoj tra la mondo.

De la recitalo de sudafrika kantisto Miriam Makeba en 1978, al la unuaj dismetoj de subakvaj sensiloj de la Interregistara Oceanografia Komisiono, kaj alfabetigaj kampanjoj en Kaboverdo, Irano kaj Peruo – la fotojurnalisto ilustris tion, kion la organizo faras ĉiutage, en Parizo kaj sur la kampo. La fotoj de Roger estas esenca atesto kaj grava kontribuo al la vida memoro de UNESKO.


“La organizo proponis al mi la mondon kaj kontribuis al mia konsciiĝo pri diferencoj, pri malegalecoj, pri ‘la esperoj de la plej malfavorataj’, resume, pri la ‘Aliuloj’”, skribis la fotistino en sia libro *Un chemin vers la paix* (Vojo al Paco, 2016), kies anglo-hispana eldono estis publikigita en 2018.

La *UNESKO-Kuriero* dum la jaroj dediĉis multajn paĝojn al la fotoj de Roger. Ŝia laboro ankaŭ aperis en pluraj internaciaj ekspozicioj. ■

-El la angla esperantigis Mao Zifu (Ĉinio)

Tiu ĉi retrospektivo memorfestas la 75-an datrevenon de UNESKO-Konstitucio, kiu ekvalidis la 4-an de novembro 1946.

Detalo de la Templo de Izisa, en la insulo Philae de la rivero Nilo, Egiptio, 1968. La elstara arkeologia areo estis minacata de subakviĝo post la konstruado de la Baraĵo Aswan. En 1960, UNESKO lanĉis la ambician kaj sukcesan dudekjaran Internacian Kampanjon por Savi la Monumentojn de Nubio.





Restarigo de la verando de la Kariatidoj ĉe Erechtheion, 1968. En 1977, UNESKO lanĉis kampanjon por la restarigo kaj konservado de la Akropolaj Monumentoj, kiuj estis detruitaj de jarcentoj da milito, tertremoj, fajroj, akvodamaĝo, aerpoluado kaj amasa turismo.

Kerubskulptaĵo estanta purigita ĉe restariga laborejo en Palazzo Davanzatti, Florenco, 1967, kiel parto de internacia kampanjo lanĉita de UNESKO por la protektado kaj restarigo de la kulturaj havaĵoj de Florenco, difektitaj de la inundo en la 4-a de novembro 1966.



Pentraĵo de venecia artisto Giovanni Battista Piazzetta (1682-1754) en la baziliko de la Sanktaj Johano kaj Paŭlo, la plej granda preĝejo en Venecio, estas restaŭrata de profesoro Pedrocco en 1968.

Akvopluo kaŭzita de rubo forĵetita en la Venecia Laguno, 1968



1



2





1. Recitalo de la sudafrika kantistino, kantverkistino kaj aktivulino por civitanrajtoj Miriam Makeba en vespero por memorfesti la oficialan lanĉon de la Internacia Kontraŭ-Apartiga Jaro en la sidejo de UNESKO, Parizo, la 21-an de marto 1978

2. La violonisto kaj direktisto Yehudi Menuhin kaj la pianisto kaj komponisto Wilhelm Kempff provludas ĉe Salle Pleyel en Parizo, la 9-an de januaro 1974, por koncertoj memorfestantaj la 25-an datrevenon de la Internacia Muzika Konsilio fondita laŭ peto de UNESKO.

3. Léopold Sédar Senghor (maldekstre), Prezidanto de Senegalo, kun Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, dum vizito al la Ĉefsidejo en Parizo, majo 1978


4. La hinda muzikisto kaj komponisto Ravi Shankar ludas en muzika vespero ĉe la Ĉefsidejo en Parizo, por memorfesti la 20-an datrevenon de UNESKO, 1966.



Specimenoj de marakvo estas prenataj por mezuri la temperaturon kaj salecon de la Nacia Centro de Oceanografia Esploro, ĉe Nosy Bé, Madagaskaro, 1989. La projekto estis parto de la Interregistara Oceanografia Komisiono (IOC) de UNESKO.



Studento simulas miniaturajn tertremojn transdonatajn al "skuiĝanta tablo" per hidraŭlika aparato, Tokio, 1969. La projekto de la programo de Unuiĝintaj Nacioj pri Disvolvo (angle UNDP), por kiu UNESKO estas la plenuma agentejo, kunlaboras kun la japana registaro por trejni fakulojn ĉe la Internacia Instituto de Sismologio kaj Tertrema Inĝenierado por helpi evolulandojn kontraŭbatali la efikojn de sismoj.




Farmistoj de Tassette, Senegalo, diskutas siajn zorgojn en kampara eduka radioprogramo, 1971.

Infanoj kaj plenkreskuloj partoprenas en alfabetiga provprojekto de la irana registaro, prizorgita de volontuloj de la Scio-Armeo, kiuj ankaŭ agadis kiel instruistoj en kamparaj lokoj servante en la armeo, Qazvin, Irano, 1965.







1. Lernejo/komunuma centro en Pamplono, Peruo, 1967, subtenata de UNESKO. Lernejo por 600 knabinoj dum la tago, ĝi iĝis distra centro por gepatroj en la vesperoj kaj semajnfinoj, oferante kursojn kiel legopovo, kudrado, trikado kaj sukurismo.




2. Lernanto ĉe la bazlernejo en la urbo Koon Po, sude de Seulo, Korea Respubliko, vizitadita de 1 430 infanoj, 1969.

3. Labor-orientita plenkreska alfabetiga kurso, Ekvadoro, 1967. "Por mi, 35-jara fotisto en 1967, nenio estis pli kortuŝa ol la alfabetigo de pli maljunaj homoj. Tiu ĉi veterumita vizaĝo, klinita super lia kajero en la lumo de olelampo, en perdita kabano, estis, kaj restas, perfekta momento de kontemplado de pentraĵo", skribis Dominique Roger.

4. Virinoj ĉeestantaj alfabetigan programon en kampara agrikultura zono sur la insulo Fogo, Kaboverdo, 1990.

5. Studento ĉe Chateau Holden, bonstatiga centro por junaj ŝuciristoj en Douéra, Alĝerio, 1964.

$$\forall a \in \mathbb{Z}^+, f(n) = \frac{1}{1+x} - k = \frac{1}{1+x} + \frac{(x-1)(x+1)}{x+1}$$



al



Malferma scienco:

Tutmonda movado populariĝas

La pandemio KOVIM-19 alportis signifajn atingojn al la maniero kundividi sciencajn datumojn. Sed restas ankoraŭ longa vojo ĝis malferma scienco vere entenos nelimigatan aliron al sciencaj publikaĵoj, datumoj kaj kunlabora esploro.

Dum la ideo pri komuna bono gajnas terenon – precipe ĉe la pli juna generacio de esploristoj – la varigado de scienca kono daŭras. Temas pri la tuta rilato inter civitanoj kaj scienco, kiam ni konsideras tiujn aferojn.

Chérifa Boukacem-Zeghmouri

Profesoro pri Informada kaj Komunikada Sciencoj, Universitato *Claude Bernard Lyon 1*.

La pandemio de KOVIM-19 permesis al ni rimarki grandan ondon de kunlaborado kaj kundividado de scienca kono inter esploristoj – en klopodo alfronti la viruson, liveri la plej efikajn kuracadojn kaj precipe trovi vakcinon. Ni vidis ke bariloj falis kiam la ĉefaj sciencaj eldonaj grupoj – kiel *Elsevier*, *Springer Nature* kaj *Wiley* – malfermis la aliron al miloj da esplorartikoloj. Tio ebligis al sciencistoj de la tuta mondo legi ilin, teni sin informitaj pri esploraj atingoj kaj tiel akceli sian laboron.

Datumoj kaj metadatumoj – la datumoj kiuj priskribas aliajn datumojn – estis ankaŭ malfermataj kaj kundividataj inter grupoj de sciencistoj. Dum kelka tempo, scienca kono, komuna bono, eskapis el la malnovaj kaj bone establitaj formoj pri komerca alproprigo, kiuj ne favoras la disvastigo de scienca kono.

Ĉi tiu nova kunlaboro lanĉis diskutojn favore al “malferma scienco”. Se la bezono

pri malfermiteco estas sentata tiom forte kiel hodiaŭ, tio okazas ĉar scienco – kiam temas pri la publikigado de ĝiaj rezultoj – iĝis parte nealirebla. Krom la troa kosto de la produktado por esploristoj, fidataj publikaĵoj estas ankaŭ tro multekostaj por multaj el la bibliotekoj kiuj ŝatus aboni ilin.

La varigo de scienca kono

Analizo de la historiaj kondiĉoj kiuj kondukis al la apero de movadoj favoraj al malferma scienco, montras al ni ke ĉi tiu “fermeo” estas profunde enradikiĝinta en longa marŝo al la varigado de scienca kono. Ekde la fino de la Dua Mondmilito, scienca kono estis alte profitebla merkato – enspezigante miliardojn da eŭroj ĉiujare al siaj ĉefaj roluloj, la sciencaj eldonistoj.

En sia ĝisnuna vortumado, la postuloj por malfermi sciencon estas pli ligitaj al la

komercaj kaj manaĝeraj kialoj kiuj difinis la organizadon de scienco ekde la jaroj 1950, ol al la denuncado de totalismo kiu provokis la Duan Mondmiliton.

Tamen, ili ankaŭ rilatas al pli fruaj asertoj de la usona sociologo Robert K. Merton [1910-2003] kaj la brita filozofo pri scienco naskiĝinta en Aŭstrio Karl Popper [1902-1994]. Ili denuncis ĉi tiujn monopolojn kiel novajn formojn de komerca totalismo kiuj alproprigis komunan bonon, sciencon konon – kreitan kaj produktitan per la helpo de publikaj aktoroj kaj publika financado.

Alireblo, kundivido, travideblo, reuzo kaj interago kun socio estas valoroj por kiuj pledas malferma scienco. Ĉi tiuj valoroj povas nun esti tradukataj en konkretajn vortojn, danke al ciferecaj platformoj kaj infrastrukturoj. Ĉi tiu “reformulado” devus esti konsiderata ankaŭ en la kunteksto de la evoluo de niaj socioj. Scienco devas renovigi siajn ligojn konsiderante fenomenojn kiel la disvastigo de falsaj novaĵoj, la kresko de populismo kaj la pliseveriĝo de malegalecoj.



Nova generacio

La pandemio ebligis igi publika alian fenomenon rilatan al la malfermo de scienco, antaŭe limigitan al la akademia rondo.

Ni nun vidas la aperon de nova generacio de retbazitaj platformoj, administrataj de sciencaj komunumoj kiuj adoptas la principojn de malferma scienco, ĝiajn bonajn praktikojn kaj normojn.

Junaj esploristoj, kiuj ludas gravan rolon en ĉi tiuj komunumoj, estas testantaj, novigantaj kaj eksperimentantaj por reinventi la modelon de scienca komunikado kaj igi ĝin pli malferma – inkluzive de la socio, kiu povas kontribui al la procezo per komentoj. Ĉi tiuj junuloj apartenas al la generacio kiu kreskis kun la reto kaj la cifereca teknologio. Ili ne timas ŝanceli sistemon kiu estas nepenetrebla sen la efiko “Sezamo, malfermiĝu!”, kiun

“

La intereso pri malferma scienco troviĝas nun en la internacia politika agendo

reprezentas publikiĝo en prestiĝaj, tre selektemaj kaj tre multekostaj revuoj.

Kelkaj el ĉi tiuj platformoj ludis kernan rolon en la disvastigado de scienca informo pri KOVIM-19.

Esploristoj povis kundividi siajn rezultojn realtempe por antaŭeniri pli rapide kaj pli kunlabore.

Ĉi tiuj platformoj bazas sian valoron sur progresaj trajtoj kaj servoj kiuj dependas de artefarita inteligenteco por sia

disvolviĝo – ĉefe por alfronti la senĉesan fluon de rimedoj.

Kvankam ili ne disponas je reviziado fare de kolegoj en la tradicia signifo, ili eksperimentas per modeloj kiuj ebligas formon de ekspertizo donata en artikoloj, surbaze de la kunlabora mobilizado de komunumoj.

Financaj agentejoj pri privata esploro – kiel la Fondaĵo *Bill & Melinda Gates* kaj la Iniciato *Chan Zuckerberg* – interesiĝas pri ĉi tiuj novaj modeloj kaj subtenas ilin. Ĉi tiu subteno havigas oportunojn pri reala financado, sed ĝi ankaŭ prezentas riskojn pri rekupero, aŭ eĉ transpreno, kiel ni vidis en la pasinteco.

La intereso pri malferma scienco ne limiĝas al la akademia komunumo – ĝi nun troviĝas en la eŭropa kaj internacia politika agendo. Ĉi tiu movado preteriras malferman aliron al sciencaj publikajoj. Ĝi ankaŭ inkluzivas la malfermon de esploraj datumoj – laŭ la principo “tiel malferme kiel eble, tiel ferme kiel necese” – kaj la



Illustrations: © Boris Séméniaiko for The UNESCO Courier

Rekomendo de UNESKO pri Malferma Scienco

En la 41-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en novembro 2021, la Membroŝtatoj de la Organizo pridiskutas malneton de *Rekomendo pri Malferma Scienco*. Ĝia celo estas difini la kundividatajn valorojn rilatajn al malferma scienco; proponi konkretajn reguligojn por permesi liberan aliron al datumoj; kaj antaŭenigi la disvastigon de scienca kono tutmonde.

La reviziado estas la kulmino de inkluziveca kaj travidebla dujara konsultadprocezo, dum kiu UNESKO

starigis partneriĝon de sciencaj akademioj, universitatoj, librejoj, eldonejoj kaj junaj esploristoj.

Scienca Komitato konsistanta el tridek fakuloj el la tuta mondo ricevis la taskon pretigi preparan projekton post tutmonda konsultado de 2 900 partoprenantoj, inkluzive de fakuloj, civila socio, neregistaraj organizaĵoj kaj agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj.

La Rekomendo estas esenca paŝo al la faciligado de internacia kunlaboro kaj universala aliro al scienca kono.

-El la angla esperantigis Manuela Burghilea (Brazilo)

civitanan sciencon kiu karakterizas la 21-an jarcenton. Kelkaj landoj komencas adopti politikojn por kundividi sciencon kono.

En alia manifestado de ĉi tiu intereso, UNESKO sendas sian Rekomendon pri Malferma Scienco al siaj Membroŝtatoj en novembro 2021, por faciligi internacian kunlaboradon kaj universalan aliron al scienca kono.

Ĉi tiuj rekomendoj kovras publikaĵojn, datumojn, programajn kaj edukajn rimedojn, kaj civitanan sciencon, por substreki la gravecon de la konservado de scienco en la manoj de akademiaj komunumoj kaj civitanoj. Ili povas tiam labori kune por certigi ke la celoj de sciencaj antaŭenigoj estas difinitaj sen la logiko de monigo kaj de ties limigoj.

Libere alireblaj publikaĵoj

Ĉi tiu nacia kaj internacia politika kunteksto kreskigis esploran kadron kiu ŝajnintus utopia eĉ antaŭ dudek jaroj. La nombro de libere alireblaj publikaĵoj tutmonde daŭre kreskas – oni taksas ke ĝis 2030, sepdek kvin elcentoj de la publikaĵoj estos libere alireblaj.

La konscio pri libera aliro al esploraj datumoj estas kreskanta, kaj la komprenado de la gravaj aferoj kaj praktikoj estas pliiĝanta. Novaj formoj de scienca interŝanĝo – uzantajn sociajn retejojn kaj videon – estas improvizataj laŭ iniciato de la esploristoj mem.

La ĉefaj eldonaj grupoj pri scienco, kiuj antaŭe estis ĝisostaj kontraŭuloj de malferma scienco, iĝis nun fervoraj

defendantoj de malfermeco. Por fari tion, ili translokas siajn ciferecajn platformojn por subteni la daŭran transformon.

Intertraktadoj inter eldonistoj kaj librejoj pri abontarifoj iĝis nun intertraktadoj por “transformaj interkonsentoj” – kie la fokuso estas pri la indicoj por publikigo en la revuoj de la eldonisto, aŭ la nombro de artikoloj kiuj povas esti publikigataj sampreze. Ĉi tiuj aferoj estas esencaj en tempo kiam universitatoj provas plibonigi siajn internaciajn rangojn – kio enplektas la nombron de publikaĵoj.



Alireblo, kundivido, travideblo, reuzo kaj interago kun la socio estas valoroj por kiuj pledas malferma scienco

La malegalecoj kiuj, ĝis nun, ekzistis nur inter legantoj – inter tiuj kiuj havas aliron kaj tiuj kiuj ne havas aliron – estas transformataj al malegalecoj inter aŭtoroj; inter tiuj kiuj povas pagi la kostojn kaj publikigi kun libera aliro, kaj tiuj kiuj ne povas.

La lastaj nur povos publikigi en tradiciaj revuoj, kiuj donas aliron al siaj enhavoj per abono, kio ankaŭ estas tre multekosta.

Malferma scienco estas do disvolvata ĉe vojkruco de pli kaj pli internaciigataj politikoj kaj pli aktivaj komunumoj – kies iniciatoj kaj praktikoj estas junigataj kaj organizataj ĉirkaŭ modeloj kreataj ekster antaŭekzistantaj modeloj.

La novaj modeloj kiuj aperas provas eskapi la monopolojn de la pasinteco. La transformado de scienco okazas ĝuste ĉirkaŭ ĉi tiuj aferoj – liberiĝo de la moniga logiko; de malegalecoj rilataj al aliro al kono; kaj de novaj formoj de monopolo pliseverigataj per ciferecaj teknologioj. Ĉio ĉi por pli bone alfronti la kompleksajn defiojn de la socio. ■

-El la angla esperantigis Manuela Burghilea (Brazilo)

Antaŭ ol esti publikigita, scienca verko estas pritaksata de fakuloj, kiuj taksas la ĝustecon de la metodo kaj la fidindecon de la rezultoj. Sed tiu kritika procezo havas gravajn difektojn. Cetera ĝin preteratentas la ĝenerala publiko, senigita de la rimedoj necesaj por kompreni kiel scienco disvolviĝas.

Fari sciencajn taksojn pli travideblaj

Alex Holcombe

Profesoro ĉe la Fakultato de Psikologio, Universitato de Sidnejo, Aŭstralio.

Post jaro kaj duono en la pandemio de KOVIM-19, scienco savis multajn vivojn. Sen baza biomedicina esplorado, la vakcinoj ne povus esti kreitaj nek taksitaj por difini iliajn sekurecon kaj efikecon. Sed la scienca komunumo ne estis tiel klara pri aliaj esencaj aferoj rilataj al la pandemio. La utileco de maskoj aŭ fidindeco pri la manieroj de virus-dissendo, ekzemple, ne konklude establiĝis, parte, ĉar multaj el la koncernaj esploroj havas difektojn.

Scienco estas kompleksa, kaj estas facile malbone konduki scian esploron. Por efike taksu la implicojn de ĉi tiuj esploroj, ni bezonas spertulojn por revizii ilin. Ĉi tio nomiĝas kolega revizio – la tradicie konfidanca procezo por taksu novajn sciencajn rezultojn.

Kiel esploristo, mi scias proprasperte, ke aliaj esploristoj ofte vidas difektojn en mia laboro, kiuj eskapis al mi. Sed la kolega revizia procezo mem ankaŭ povas esti misa.

La plej freŝaj sciencaj rezultoj estas fidindaj nur kiam iliaj aŭtoroj havis

tempon sendi ilin por aldonaj testoj, kaj kiam multnombraj spertuloj havis ŝancon esplori ilin. Kiam nova esplorado estas publikigita, sciencistoj kaj aliaj povas vidi nur la verkojn de la esploristoj, kiuj faris la esploron kaj nenion pli.

Malantaŭ fermitaj pordoj

Tradicie, la kolega revizia procezo komenciĝas post kiam la teamo de




Illustration: © Francesc Roig for The UNESCO Courier

“

Doni al la publiko aliron al debatoj povus konduki al pli bona kompreno de scienco

sciencistoj sendas al scienca revuo manuskripton priskribantan novajn rezultojn. Redaktoro, kutime profesoro de alia universitato, legas ĝin kaj decidas ĉu la verko konformas al la normo de la revuo. Se jes, la redaktoro varbos fakulojn pri la koncerna temo.

Ofte unu aŭ pluraj el la spertuloj tiam liveros al la revuo longan liston de komentoj kaj kritikoj, kiuj estas plusendataj al la aŭtoroj.

La komentoj povus retroirigi niajn konkludojn kaj defii nin plifortigi nian kazon aŭ mildigi iujn el niaj asertoj.

Kiel aŭtoro, mi ne ŝatas vidi kritikojn al mia laboro, sed mi scias, ke ili estas necesaj por scienca progreso. Korektinte iujn el la difektoj en nia logiko, aŭ reviziinte la supozojn ne pravigitajn, ni povas esti pli certaj pri niaj konkludoj, kaj esperi, ke ili havos pli grandan efikon.

La priaj interŝanĝoj, kiuj sekvas inter la aŭtoroj, redaktoro kaj spertaj recenzistoj, rezultigas finan manuskripton, kiu analizas la datumojn pli rigore kaj kutime donas pli singardan aliron pri ĝiaj implicoj, ĉu ĝi estas aŭ ne finfine akceptita por publikigo.

Bedaŭrinde, la publiko neniam malkovras, kiuj elementoj de la esploro estis pridubitaj, aŭ kiuj aspektoj de la debato estis la plej polemikaj.

Ĉi tio estas ĉar la kolega revizia procezo okazas malantaŭ fermitaj pordoj, ene de la pasvorte protektitaj muroj de la datumbazo de la revuo. Por scii la pridubitajn elementojn de flanke de diversaj spertuloj, nepras, ke la publiko konsci pri la opiniokonfliktoj, kiuj estiĝas dum kolegaj revizioj.

Pridisputataj esploroj

En 2020, du esploroj pri la efikoj de hidroklorokvino kaj iuj kontraŭhipertensiaj drogoj en la evoluo de KOVIM-19 estis retiritaj post publikigo kaj klasika kolega revizio.

The Lancet kaj *The New England Journal of Medicine (NEJM)*, du el la plej prestiĝaj medicinaj revuoj en la mondo, petis de spertuloj kolege-egalecan revizion de la esploroj. *NEJM* akceptis la artikolon ricevinte komentojn de kvar spertuloj, kaj, kiel kutime, ajna necerteco esprimita aŭ demandoj starigitaj dum la kolega revizio ne publikis.

Ni ankoraŭ ne scias, kion diris la spertuloj. Hodiaŭ ni scias ke multaj sciencistoj ne partoprenintaj la takso-

proceduron, tuj rimarkis la ekziston de indicoj pri tio ke la datumoj prezentitaj en la artikolo estis pridubindaj, kaj sekve, ili sendis recenz-leterojn al la gazeto tuj post la publiko.

Ĉi-kaze la grandega intereso pri la temo instigis spertulojn revizii la artikolon kaj verki siajn zorgojn. Bedaŭrinde, ĉi tio estas tute nekutima.

Spite al la graveco de pandemi-rilataj esploroj, esplortaksoj malofte fariĝas publikaj. En 2013, iuj esploristoj kredis, ke ili reproduktis malgrandskale, kio neniam estas farita, la proteinojn ĉe la surfaco de la viruso, kiu kaŭzas aidsoson. Ilia artikolo estis publikigita en unu el la plej sciencaj revuoj de la mondo.



Virinoj kaj anoj de malplimultantoj de evolulandoj restas ekster la radaro de la spertaj sciencistoj

Sed kiel oni poste malkovris, almenaŭ kvar aliaj revuoj antaŭe malakceptis ĝin, iuj el ili pro forta kritiko de iliaj samrangaj fakreviziantoj. Nenio publikigis pri tio. Nur danke al iuj ĵurnalistoj, la scienca komunumo eksciis pri ĉi tiu afero.

Responde al kreskantaj kritikoj, multaj revuoj nun malfermiĝas, donante al eksteruloj ŝancon vidi la vivajn malkonsentojn, kiuj estas karakterizaj por avangarda scienco. Kaj multaj esploristoj komencis afiŝi siajn manuskriptojn en la interreto antaŭ ol sendi ilin al revuoj. Retejoj por ke sciencistoj debatu kaj kritiku la plej freŝajn esplorojn, estas ege aktivaj.

Redaktoroj ĉe la revuoj pli kaj pli malfacile trovas spertulojn por la tradicia revizia procezo. Multaj redaktistoj tro emas fidi spertulojn, kiujn ili jam konas, aŭ veteranajn esploristojn tre serĉatajn, kiuj ne povas kontentigi ĉiujn postulojn. Ĉi tiu praktiko, krom malrapidigi la procezon de kolega revizio, ne spegulas la ŝanĝiĝantan demografion de la scienca komunumo.

Hodiaŭ pli multaj virinoj kaj anoj de malplimultantoj okupiĝas pri scienco, kaj kontribuoj de evolulandoj, kiel Ĉinio, rapide kreskas. Sed multaj el ĉi tiuj esploristoj restas ekster la radaro de la spertaj sciencistoj, redaktistoj de la ĉefaj sciencaj revuoj, kiuj sidejas plejparte en Nordameriko kaj Eŭropo.

Kun la tempopaso, ĉi tiuj problemoj povus esti solvitaj kun la apero de novaj vojoj por kritiko kaj komento. Iuj revuoj nun invitas spertulojn publikigi siajn komentojn en iliaj alligitaj retejoj. La disvolviĝo de ĉi tiu praktiko povus antaŭenigi diversecon en kolegaj revizioj.

Pli bona kompreno de scienco

Estas la dialogo inter fakuloj en la esplora komunumo, kio difinas la limon de scio, sekve kio transdonas la malcertecon ligitan al la efikeco de nova vakcino, pri la prognozoj de pli da sekecoj en la estonteco de lando, pri la kredindeco de dietaj konsiloj aŭ taksoj pri la ekonomiaj konsekvencoj de tarifoj.

Se oni donas al la ĵurnalistoj kaj al la publiko la eblecon aliri parton de la debatoj inter spertuloj, estus pli zorgaj la novaĵoj diskonigitaj en la amaskomunikiloj, kio faciligos pli bonan komprenon de scienco ĝenerale.

Ankaŭ la spertuloj profitos. Havante aliron al iuj el la komentoj de la kolegaj revizioj, esploristoj malpli supozus, ke ilia eltrovo estas tute solida, kaj pli emus rekonsideri siajn konkludojn.

Profitos esploristoj. Ankaŭ la scienco.



-El la angla esperantigis Maritza Gutiérrez González (Kubo)

Latin-Ameriko: La ora epoko de dinosaŭroj

Miriam Pérez de los Ríos

Paleontologo, doktoro pri biologia antropologio kaj esploristo ĉe la Universitato de Ĉilio, Miriam Pérez de los Ríos specialiĝis pri la evoluo de hominoj el la Mioceno (antaŭ 23 ĝis 5 milionoj da jaroj) kaj partoprenas la gvidkomitaton de la Ĉilia Asocio de Paleontologio. Ŝia esplorado fokusiĝas en la identigon de filogenetikaj rilatoj inter specioj per la studo de kraniaj fosilioj.



En lastaj jaroj estiĝis tia multiĝo de gravaj paleontologiaj eltrovaĵoj en Latin-Ameriko, ke oni foje nomas la regionon “Dinosaŭra fabriko”. Nia gasto, paleontologo kaj specialisto pri la evoluo de Miocenaj prahomoj – simioj, kiuj vivis antaŭ 23 milionoj ĝis 5 milionoj da jaroj – klarigas ke ĉi tiuj sciencaj progresoj estas rezulto de pliigita intereso pri la fako kaj signifa kontribuo de novaj esploraj metodoj.

Intervjuo farita de Laura Berdejo

UNESKO



▼ La kvarpedaj longkolaj herbovoraj dinosaŭroj, titansaŭraj saŭropodoj, kvankam loĝintaj tra la tuta mondo, estis escepte oftaj en Latin-Ameriko.

● Kio estas la signifo de la lastatempaj malkovroj en Latin-Ameriko?

Latin-Ameriko kaj precipe la Suda Konuso estas tre gravaj por nia kompreno pri la origino kaj evoluo de dinosaŭroj. Multaj gravaj malkovroj estis faritaj en la regiono de La Rioja, en Argentino, lando kun longa paleontologia tradicio. Unu el la plej malnovaj konataj dinosaŭroj, *Eoraptor lunensis*, malkovrita en 1991, loĝis en la regiono antaŭ ĉirkaŭ 230 milionoj da jaroj. Teamoj en Brazilo nuntempe serĉas egalan pli malnovan specimenon ĉe la landlimo.

Estas multaj registroj pri ĉi tiuj bestoj tra la mezozoika epoko (inter 250 milionoj kaj 66 milionoj da jaroj antaŭe). Restaĵoj de ĉi tiuj dinosaŭroj troveblas sur ĉiuj kvin kontinentoj, ĝis ilia amasa formorto fine de la kretacea periodo, antaŭ 66 milionoj da jaroj. La specimenoj trovitaj en la regiono kovras la tutan tempon de ilia vivo sur la tero kaj formortis samtempe kun siaj kolegoj sur la resto de la planedo.

Tamen, elfosadoj en la Suda Konuso de Latin-Ameriko malkovris la restaĵojn de titansaŭroj – la plej grandaj dinosaŭroj – apartenantajn al specioj unikaj, kiel *Chilesaurus diegosuarezi*, unu el la malmulte konataj herbovoraj teropodoj. La elfosadoj kondukis ankaŭ al malkovro de la plej sudaj dinosaŭroj, reprezentitaj de grandega saŭropodo trovita en Torres del Paine, Ĉilio.

● Ĉu ĉi tiuj malkovroj ŝanĝas kion ni jam scias pri dinosaŭroj en planeda skalo?


Kompreneble ili faras, ĉar en paleontologio nepras kompari la specimenojn kiujn ni malkovras kun tiuj jam identigitaj por establi ilian filogenetikan pozicion – nome, iliajn familiajn rilatojn al aliaj dinosaŭroj. Pliaj elfosadoj kaj la komparo kun konataj restaĵoj permesas al ni kompreni ilian

© Courtesy: Oscar Sanisidro

evoluon kaj taksu, per la observado de morfologiaj ŝanĝoj, kiel okazis speciĝo (la formado de novaj kaj distingaj specioj en la paso de evoluo).

Jen kiel la Nacia Muzeo de Natura Historio en Santiago, Ĉilio, povis pruvi, en aprilo 2021, ke la restaĵoj trovitaj en la dezerto Atacama (norde en la lando) antaŭ ĉirkaŭ tridek jaroj apartenis al nova malkovrita specio de titanosauro, *Arackar licanantay*.

“ Unu el la plej malnovaj konataj dinosaŭroj estis malkovrita en Argentino



▼ Bitigita rekonstruo de *Chilesaurus*, 2018. Malkovrita en suda Ĉilio kaj unue priskribita en 2015, la plantomanĝanta dinosaŭro vivis antaŭ ĉirkaŭ 150 milionoj da jaroj.

CC BY-SA 4.0 by Liam Elward

● **Kiel vi eksplikas tian sinsekvon de malkovroj en Latin-Ameriko en la lastaj jaroj?**

Ĉi tiuj lastaj malkovroj montras la progreson de Latin-Ameriko kadre de studado de sciencoj kiel ekzemple paleontologio. Historie, Argentino gvidis la kompetentecon pri la fosilia registro en la regiono pro la granda intereso pri tiu fako, kaj la ĉeesto de gvidaj paleontologoj kiel José Fernando Bonaparte, kiu malkovris pli ol dudek speciojn, kaj Rodolfo Casamiquela, specialisto pri la restaĵoj de ĉi tiuj grandaj saŭruloj.

En la najbaraj landoj kiel Ekvadoro, Kolombio, Ĉilio, Brazilo kaj Peruo, estis eksplodo de scioj en la lastaj jardekoj, danke al la laboro de malsamaj teamoj aligitaj al universitatoj kaj esplorcentroj, kelkaj el kiuj estas asociitaj kun internaciaj teamoj, ĉefe el Usono.

● **Ĉu la evoluo de teknikoj de studo influas la oftecon de malkovroj?**

Mi dirus ke la ofteco de eltrovoj ne tiom dependas de la metodoj uzataj, kiuj estas ankoraŭ sufiĉe tradiciaj, kiel pri la kreo de lokaj teamoj kun alta nivelo de scienca trejnado. En lastaj jaroj, multaj junaj sciencistoj kiuj iris al Usono aŭ Eŭropo por doktoriĝi, revenis al sia hejmlando kaj komencis disvolvi esplorprojektojn pri la loka fosilia faŭno. Ĉi tio kondukis ne nur al trovo de novaj materialoj en neesploritaj kaj sufiĉe izolitaj zonoj (kiel Patagonio aŭ tropikaj pluvbarbaraj areoj) sed ankaŭ al 'remalkovro' de materialo kiu estis forgesita en naciaj aŭ lokaj muzeoj, atendante ke paleontologo alportu ĝin reen al vivo.

Estas vero, ke la teknikoj en laboratorio ebligis malĉasi novajn ecojn de fosilioj, pri kiuj antaŭe estis neeble taksu, kiel la internaj kavoj de kranioj aŭ la interna orelo, per komputila tomografio. Ankaŭ la studo de osta kresko estas ebla hodiaŭ, danke al histologiaj studoj, kiuj analizas la strukturon de la vivaj histoj. Nia scio pri la moviĝo kaj la mordado de la bestoj progresis ankaŭ danke al la Analizo de Finiaj Elementoj (angle *FEA*), metodo de nombra kalkulo kiu permesas, inter aliaj aferoj, simuli mekanikan konduton.

Sinsekvaj eltrovoj

Ĝi estas la plej granda dinosaŭro iam malkovrita, laŭ studo publikigita en januaro 2021 en la revuo *Creataceus Research*. La malkovro okazis dum elfosadoj en la valo de Neuquén, sudokcidenta Argentino. Ĉi tiu 98-milion-jara giganta saŭropodo estus eĉ pli granda ol la "Titano de Patagonio" *Patagotitan*, kiu estis la plej granda konata ĝis tiu dato.

Paleontologoj elfosis 24 vertebrojn kaj plurajn ostojn el la pelvo. Ĉi tiu grupo de dinosaŭroj, longkolaj kaj grandaj saŭropodoj, loĝis tra la tuta mondo sed iuj el iliaj lastaj reprezentantoj enloĝis Latin-Amerikon, kie ili evoluis por fariĝi gigantoj.

En marto de ĉi tiu jaro la Nacia Universitato de San Luis (Argentino) anoncis la malkovron de *Llukalkan aliocranianus*, grandega karnomanĝulo, kiu travagis la teritorion antaŭ 80 milionoj da jaroj. Monaton poste prezentis la Nacia Muzeo de Natura Historio de Ĉilio *Arackar licanantay*, titanosauiron pli ol ses metrojn longan, kiu vivis antaŭ 66 milionoj da jaroj en la dezerto Atacama, en la nordo de la lando.

-El la angla kaj la hispana esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)



▼ Arackar licanantay, la tria specio de nebirda dinosaŭro malkovrita en Ĉilio, estas unika. Malkovrita en la 1990-aj jaroj de la geologo Carlos Arévalo en la regiono de Atacama, la “nova” dinosaŭro estis ekspoziciita en la Ĉilia Nacia Muzeo de Natura Historio en aprilo 2021.

● **Kiel prezentiĝas la panoramo de paleontologia esplorado en Latin-Ameriko dum la periodo de KOVIM-19?**

La internacia sankunteksto signifas defion por iu ajn esploristo kiu devas plenumi taskojn en kampo kaj en laboratorio. Multaj el la teamoj renkontas la elirejojn al la kampo nuligitajn ĉar iliaj internaciaj partoprenantoj ne povas helpi, la financadoj estas suspenditaj aŭ ĉar multaj el la institucioj, kiuj subtenas ekonomie ĉi tiujn laborojn, bezonis asigni siajn buĝetojn al batalaj taskoj kontraŭ la pandemio.

Krome, ankaŭ la muzeoj kaj sciencaj institucioj fermis siajn pordojn, do kolektoj kie la analizindaj fosilioj troviĝas, fariĝis neatingeblaj. Same, la kongresoj de paleontologio bezonis reformuli sian sistemon kaj devis esti neĉeestaj, kio kondiĉas la interŝanĝon de specialistoj al nuraj paroladoj registritaj, kaj ĉe kio perdiĝas retrosciigo kaj diskuto, kiuj estas fundamentaj en scienco. Mi supozas, kiel iu ajn sciencisto aŭ sciencistino, ke ni sopiras al la momento en kiu ni povos denove renkontiĝi kun niaj kolegoj kaj kun la materialo de studo.

● **Se explorekcio, kiel tiu en kiu vi laboras, devus ellabori “revan liston” de rimedoj kaj kapabloj por la venontaj kvin jaroj, kion vi petus?**

De mia vidpunkto, la bezonoj de ĉiu ajn esplora kerno estas esence la samaj: financado, volemo kaj bone trejnitaj teamoj. Teamo ne povas fari sian laboron, eĉ kiam ĝi deziras profunde revolucii la nacian aŭ regionan paleontologion, se ne estas institucioj kiuj valorias kaj subtenas ĝiajn projektojn.

Eĉ tiel, la manko de scio de iuj el la lokaj taksantoj pri paleontologiaj esploraj proponoj ofte rezultigas, ke la projektoj ne estas taksataj pozitive kaj tio finfine signifas, ke iuj esplorlinioj ne sukcesas efektiviĝi, malgraŭ la fakto, ke ili estas ege interesaj je tutmonda nivelo.

Fine, la manko de specialistoj en la sudamerikaj landoj provokis malrapidan disvolviĝon de ĉi tiu kampo. Feliĉe, tiuj kolegoj komencas trejni novajn sciencistojn surloke, tiel ke post kvin ĝis dek jaroj, povus esti eksplodo de esploroj kun granda internacia graveco. Estus esence povi subteni ĉi tiun homan disvolviĝon kun altrangaj teamoj, kiuj ne ekzistas en la regiono aŭ kiuj ne estas internacie atestitaj kaj kies rezultoj do, ne estas akceptataj de parto de la scienca komunumo.

Malgraŭ ĉio, la paleontologio estas fako plene eksplodata en Latin-Ameriko. Multaj lokoj estas nuntempe esplorejoj de studo, precipe en Argentino, en la regiono de Neuquén, aŭ en Ĉilio, kie oni surloke studas dinosaŭrajn piedsignojn en la areo de Termas del Flaco, en la Andoj ĉiliaj. ■

-**El la angla kaj la hispana esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)**



© Stefano De Luca

▼ Miriam Pérez de los Ríos (en la unua plano) elfosanta en Rudabánya, Hungario, kie la restaĵoj de miocenaj simioj (vivintaj antaŭ 10 milionoj da jaroj) estis trovitaj.

Ĵurnalismo: Danĝera profesio

Atakoj, timigado, kaj eĉ murdo – mondwide ĵurnalistoj alfrontas seriozajn riskojn kaj minacojn ĉiutage, simple pro la fakto, ke ili plenumas sian profesion: raporti la novaĵojn kaj publikigi informojn.

Linda Klaassen

UNESKO

Dum la pasinta jardeko averaĝe ĉiun kvaran tagon unu ĵurnalisto estis murdita. Ĉiujare ekde 2016, pli da ĵurnalistoj estis mortigataj ekster konfliktaj teritorioj ol en landoj kun nuntempe kurantaj armitaj konfliktoj. Ekde la jaro 2020 ĝis la fino de junio 2021 estas raportitaj la murdoj de okdek ses murditaj ĵurnalistoj tutmonde.

Senpuneco de krimoj kontraŭ ĵurnalistoj daŭre plioftiĝas, kun naŭ el dek murdoj senpunaj. En 2020 eta pliboniĝo videblis, tamen, tutmonde dek tri procentoj de nesolvitaj kazoj estas raportitaj, kompare kun dek du procentoj en 2019 kaj dek unu procentoj en 2018. En multaj kazoj nepunado estas kaŭzita de “botelkoloj” en la juĝa sistemo mem.

Malmultaj ĵurnalistinoj troviĝas inter la viktimoj de mortigaj atakoj, sed speciale virinojn celas interretaj kaj ne-interretaj seksrilataj minacoj kaj molestado. Tiuj atakoj signifkance plimultiĝis dum la lastaj jaroj. Virinaj ĵurnalistoj identigis respondecajn politikistojn, ekstremistajn retojn kaj partizanajn

informsistemojn la plej grandaj instigantoj kaj fortigantoj de interreta perfortado kontraŭ virinoj, laŭ la uneska diskutad-dokumento *La frostiĝado: Tutmondaj tendencoj de interreta perforto kontraŭ virinaj ĵurnalistoj* (angle *The Chilling: Global trends in online violence against women journalists*) de 2021, bazita sur ampleksa interfaka esplorado farita de la Internacia Centro por Ĵurnalistoj (angle: *ICFJ*).

En la kunteksto de la pandemio KOVIM-19, ĵurnalistoj kaj aliaj profesiuloj pri la amasinformiloj en la tuta mondo estis la celoj de molestado, persekutado kaj arestado kiel rezulto de ilia laborado por informi homojn pri la sankrizo.


-El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)

Ĉi tiu artikolo estas publikigata por atentigi pri la Internacia Tago por la Fino de Senpuneco de Krimoj kontraŭ Ĵurnalistoj (rezolucio A/RES/68/163), la 2-an de novembro.

Fonto: UNESKO kaj la Ĝenerala-Direktora Raporto pri la Sekureco de Ĵurnalistoj kaj la Danĝero de Senpuneco, 2020.


MURDO DE ĴURNALISTOJ TUTMONDE, LAŬNOMBRE

Kvanto de murditaj ĵurnalistoj tutmonde, de 2006 ĝis junio de 2021



KIE ĴURNALISTOJ ESTAS PLEJMULTE MINACATAJ?

Tuta kvanto de registritaj murdoj tutmonde laŭ regiono, de 2019 ĝis junio 2021



Fonto: UNESKO kaj la Ĝenerala-Direktora Raporto pri la Sekureco de Ĵurnalistoj kaj la Danĝero de Senpuneco, 2020

Kvanto de murdoj registritaj laŭlande, 2018-2019



Fonto: UNESKO kaj la Ĝenerala-Direktora Raporto pri la Sekureco de Ĵurnalistoj kaj la Danĝero de Senpuneco, 2020

KIU ESTAS MURDITA KAJ EN KIA KUNTEKSTO?


Procentaĵo de viroj kaj virinoj inter la murditaj ĵurnalistoj, de 2018 ĝis la 30-a de junio 2021



viroj



virinoj



Murditaj ĵurnalistoj, laŭ tipo de komunikilo
de 2018 ĝis junio 2021

2018

2019

2020 - 2021



plursistemaj platformoj



televido



interreto



radio



gazetaro






Procentaĵo de ĵurnalistoj murditaj en landoj troviĝantaj nuntempe en armitaj konfliktoj, kontraŭ aliaj landoj, de 2018 ĝis 2020



Armitaj konfliktoj



Nearmitaj konfliktoj






Murdoj de dungitaj aŭ sendependaj ĵurnalistoj de 2018 ĝis junio de 2021, en procentoj



dungitoj



sendependuloj



Murdoj de lokaj kaj fremdaj ĵurnalistoj tutmonde, de 2018 ĝis junio de 2021



loka



fremda


2018



2019



2020 - 2021




Fonto: UNESKO kaj la Ĝenerala-Direktora Raporto pri la Sekureco de Ĵurnalistoj kaj la Danĝero de Senpuneco, 2020.

KIUJ ESTAS LA JUĜAJ KONSEKVENCOJ?

Stato de enketado pri murdoj de ĵurnalistoj, de 2006 ĝis 2019, en procentoj



Stato de juĝaj enketoj pri murdoj de ĵurnalistoj laŭ regiono, de 2006 ĝis 2019




VIRINOJ KAJ INTERRETA PERFORTO

El la 901 ĵurnalistoj (inter ili 714* virinoj), kiuj partoprenis la enketon en 2021: Uneska diskutad-dokumento *La frostiĝado: Tutmondaj tendencoj de interreta perforto kontraŭ virinaj ĵurnalistoj*:



Novaj eldonaĵoj



Kiel Raporti pri Migrantoj kaj Rifuĝintoj

Manlibro por edukistoj pri ĵurnalismo

ISBN 978-92-3-100456-8
304 pp., 210 x 297 mm, PDF
Elŝutebla ĉe
<https://unesdoc.unesco.org>

Ĉi tiu manlibro helpas edukistojn pri ĵurnalismo trakti aferojn pri migrado kaj rifuĝintoj, unu el la ĉefaj defioj de la 21-a jarcento. Ĉi tiu 13-modula programo liveras al edukistoj ampleksan instruplanon, kiu kovras malsamajn aspektojn de trejnado – inkluzive de analizo, esplorado, prezentado kaj etiko de primigrada raportado.

La manlibro ankaŭ estas utila por studentoj pri ĵurnalismo, kiuj ekscios, ke aferoj pri migrado kaj deviga delokiĝo implikas homojn kaj pro tio postulas precizajn faktojn, fidindajn fontojn, etikan raportadon kaj bonan praktikon.




Mondaj Heredaĵoj n-ro 98

Monitorado de Mondaj Heredaĵoj el la spaco

ISSN 1020-4202
EAN 3059630101967
72 pp., 220 x 280 mm, broŝurita eldono, 7,50 €
Unesko-Eldonejo / Publishing for development Ltd.

Distanca sondado, aŭ uzado de teknologio por kolekti informojn pri iu loko el malproksima distanco, estas kutima maniero pritaksi damaĝriskon al kulturaj heredaĵoj aŭ la staton de natur-rezervo. Analizado de bildoj faritaj de satelito estas grava parto de tio.

En ĉi tiu numero, ni malkovras kiel kunlaboroj kun agentejoj kiel la Internacia Centro pri Spacaj Teknologioj por Naturaj kaj Kulturaj Heredaĵoj (HIST), sub la aŭspicio de UNESKO; la Eŭropa Kosma Agentejo (ESA) kaj la Instituto pri Trejnado kaj Esplorado de Unuiĝintaj Nacioj (UNITAR), ebligas al spertuloj identigi lokojn, kiuj estis damaĝitaj aŭ plej bezonas protekton.



Mondaj Heredaĵoj n-ro 99

Mondaj Heredaĵoj en Ĉinio

ISSN 1020-4202
EAN 3059630101967
120 pp., 220 x 280 mm, broŝurita eldono, €7,50
Unesko-Eldonejo / Publishing for development Ltd.

La 44-a sesio de la Monda Heredaĵa Komitato okazis en Fuzhou, Ĉinio, kaj perinterrete, de la 16a ĝis la 31a de julio 2021.

En siaj jarkunsidoj, la Komitato decidas ĉu iu loko estos enskribita en la Listo de Mondaj Heredaĵoj. Ĝi ankaŭ raportas pri la stato de konservado de enskribitaj heredaĵoj kaj petas de membroŝtatoj alpreni rimedojn pri tiuj ne taŭge administrataj. La Komitato ankaŭ decidas pri ŝanĝoj en la Listo de Endanĝeritaj Mondaj Heredaĵoj.

Ĉi tiu numero de Mondaj Heredaĵoj prezentas la buntecon de kulturaj kaj naturaj lokoj en Ĉinio. Rimedoj alprenataj por administri ĉi tiun vastan heredaĵaron – kiel kaz esploroj kaj edukaj agadoj – estas pritraktataj.

-El la angla esperantigis Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)

Wang Yaping,

la unua ĉina astronautino, kiu plenumis laboron ekster la ĉina kosmostacio.




La ĉina urbo Huai'an fariĝis
monda urbo de frandaĵo,
subprojekto de Reto de
Kreivaj Urboj lanĉita de
UNESKO.



HUAI'AN

Multaj voĉoj, unu mondo

UNESKO-Kuriero aperas en ses oficialaj lingvoj de la Organizo, kaj ankaŭ katalune, Esperante, portugale, kaj koree.



Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj) : 27€ 2 jaroj (8 numeroj) : 54€

Afranko: 8 eŭroj (1 numero)

1 Membro de UEA, bonvolu pagi al nia konto ĉe UEA (celi-uj)

2 Se vi ne estas membro de UEA, bonvolu pagi 66 svisajn frankojn jare aŭ 132 svisajn frankojn por du jaroj al jena konto:

PostFinance, Nomo: LIU JUN,
IBAN: CH98 0900 0000 3048 76172

Post via ĝirado, bonvolu informi min ĉe lamondo@163.com

<http://www.esperanto.china.org.cn/>; <http://esperanto.china.org.cn/>;
<https://en.unesco.org/courier/subscribe>

Abonu la bitversion



Ĝi estas
100%
SEN PAGA

5^{Oct} World Teachers' Day 2021



**Teachers at the heart
of education recovery**

© UNESCO 2021. Icons from Shutterstock.com
ED-2021/WS/28